

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. — Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

PROLETÁŘI VŠECH ZEMÍ, SPOJTE SE! NA ESPERANTSKÉ POŠT. ZNÁMCE

Dodatkem k dřívějším údajům o esperantu na poštovních cennících, které jsme otiskli v našem listě roku 1947 na str. 89/92 a pak roku 1949 na str. 48, chceme uvést ještě některé podrobnosti.

Jedny z raných poštovních známek s esperantským textem, které vyšly v SSSR, byly známky na oslavu šestého mezinárodního sjezdu socialistických esperantistů, jenž se konal roku 1926 v Leningradě. Pomník Svobody, vyobrazený na těchto známkách, je obklopen oválem, ale málokdo si všiml, že tento ovál vroubí ve dvou pásech nápis v Morseových značkách. Je to heslo: „Proletáři všech zemí, spojte se!“, a to na vnějším páse rusky, na vnitřním esperantsky. V původním svém článku jsme neupozornili na tuto okolnost, jelikož jsme nechtěli zasahovat do tehdy právě probíhající soutěže „Československé filatelie“ (v které tento článek původně vyšel), týkající se také tohoto málo známého nápisu. Je to první případ, kdy se na poštovní známce objevily Morseovy značky.

První známky s esperantským nápisem vydal rovněž SSSR, a to roku 1925 k oslavě A. S. Popova, vynálezce bezdrátové telegrafie. Zde možno dodat, že tento Popovův portrét byl vůbec třetí portrét, který se objevil na sovětských známkách. Předěšel ho jen obraz Lenínův a Lomonosovův.

Na svých celinách (lístcích a zálepkách), určených pro cizinu, přidal SSSR k nápisům v národních jazycích (ruském, ukrajinském, arménském atd.) překlad jen esperantský, později však — snad na zákrok mezinárodní poštovní unie — uvedl na nich také znění francouzské. — O. G.

Venu al Gottwaldov!

La 6-an kaj la 7-an de oktobro 1951 aranĝos rondeto de esperantistoj en Gottwaldov-Otrokovice regionan kunvenon de esperantistoj el la regiono Gottwaldov. Vespere la 6-an de oktobro okazos interkonatiĝa vespero kun arta kaj amuza programo (komenco je la 20-a horo), la 7-an de oktobro je la 9-a horo la propra kongresa agado — ĉio en Závodní klub (Společenský dům) en Gottwaldov-Otrokovice. Posttagmeze la 7-an de oktobro ni intencas — se estos favora vetero — ŝipveturigi la partoprenantojn de la regiona kunveno sur la rivero Morava de Gottwaldov-Otrokovice al Spytihněv kaj reen. Ni invitas ĉiujn gesamideanojn el la tuta respubliko viziti nian regionan kunvenon. Precipe kore ni bonvenigos ankaŭ gesamideanojn en Slovakujo. Kiu deziras tranokti la 6-an de oktobro en Gottwaldov-Otrokovice, bonvolu aliĝi je la adreso: F. Omělka, Gottwaldov-Otrokovice 714. (Lasta aliĝdato: 30. IX. 1951.)

Klub esperantistů v Praze a Osvětová beseda v Praze 2 pořádají od října do prosince 1951

ESPERANTSKÝ SEMINÁŘ spojený s návštěvou zajímavostí Prahy.

Přednášet budou vynikající představitelé esperantského a veřejného života:

Dolfa Bartošík — Ota Ginz — Rudolf Hromada — PhDr. Stanislav Kamarýt — Inž. Ladislav Krajíc — Prof. Miloš Lukáš — Adolf Malik, ref. MIO a předseda EAČSR — Jaroslav Mařík, gen. sek. EAČSR — PhDr. Miroslav Novák, biskup ČCS — PhDr. Augustin Pitlík — RNDr. Miroslav Pulchart — JUDr. Tomáš Pumpr — Oto Sklenčka — Antonín Slanina — Julie Šupichová — Jaroslav Šustr — Josef Víttek.

I. Soboty:

Přednášky se budou konat vždy v sobotu od 18.30—21 hod. počínaje 6. X. do 8. XII. (celkem 10×). — Večery budou rozděleny na dvě části:

A. — Esperantská nauka:

Jazykové problémy — Historie esperanta — Esperantologie — Jak vyučovat přímou (Ĉe) i nepřímou methodou (s ukázkami vzorné hodiny).

B. — Přednášková (výhradně v esperantu):

Problém mezinárodního jazyka — Jazykověda — Nejnovější výzkumy v přírodovědě (od Darwina k Mičurinovi a Lysenkovi) — Nové směry ve výtvarném umění; socialistický realismus, umění v socialistické společnosti — Vývoj lidské společnosti podle marx-leninského učení — Problémy současné mechanisace — Atomová energie v míru a ve válce — O proletářském internacionalismu — Náš boj za světový mír — Úloha esperanta a jeho význam v dnešní době.

II. Neděle:

Nedělní dopoledne budou věnována návštěvě zajímavostí Prahy společně s členy Klubu esperantistů v Praze.

Podrobný rozvrh učiva dostanou všichni přihlášení v učebním plánu.

Doporučujeme zvláště mimopražským členům Svazu (obdrží 50 % slevy na dráze — noclehy v Turistické noclehárně: I. tř. Kčs 30,—, II. tř. Kčs 20,— za noc. Podle přání i v hotelu za běžné sazby.

Závazné přihlášky na sobotní „Semínář“ se zápisným Kčs 20,— a školním poplatkem Kčs 200,— a objednávkou noclehů nejpozději do 1. října na adresu jednatele Klubu: Tomáš Balda, Malá Štěpánská 7, telef. 330-14, Praha II.

POST FORIRO DE LA ĜERMANOJ

La suno sidis jam malalte super montpintoj, kiam la lastaj forigataj germanoj estis paŝintaj prefer la tablo kaj iris supren al plenigitaj veturiloj, kies motoroj jam dum rimarkinda tempo senpacience zumis. Venis kun ili ĉefserĝento Kalend por raporti al Bagár kaj Galčík, ke ĉiuj forirontoj laŭorde forlasis siajn domojn. Antoĉjo ambliis kun li kaj oni vidis laŭ tio, kiel kolege tiuj du kondutas, ke ili ekplaĉis al si reciproke. Denove iom pli bone por Antoĉjo, pensis Bagár. Li estas tirata al ordamaj honestaj homoj, oni ne timu pri li.

— Andreo pravas, diris Antoĉjo, kiam Kalend finis. Ĝi estas akurate tiel, kiel li rakontas. Sed kion li ne diras, estas, ke li ege helpis al ni. Ĉio marŝis kvazaŭ oleumita, al neniu li kriegis, nura bonkonduto ĉiufanken, kaj tamen ĉiuj obeadis kiel poŝhorloĝo. Mi asertas, ke pri li io iel eksterregulas. Kie estas severeco kontraŭ malriĉularo kaj ĉu ĝendarmo, se li ne blasfemas?

— Koncize, li ne estas ĝendarmo, diris Bagár ridetante, sed ano de Korpuso de Nacia Sekureco. Kaj tie ĉi komenciĝas la distingo. Ĝi jam ne estos, Antoĉjo, kiel dum la unua respubliko. Ili jam ne estos kontraŭ malriĉuloj, sed kun ili kaj por ili.

Antoĉjo fripone grimacis.

— Kun mi ne rapidu. Daŭros momenton, ol mi tion komprenos. Ankoraŭ hodiaŭ juketis mia dorso, kiam mi rememoras, kiel en la jaro tridek sep ili min frotis per bastonego sur la Granda placo.

Bagár estis ordiganta sur la tablo unu registron de listo kaj foliumis en ĝi, kontrolante laŭ la paĝoj. Li ĝemetis. Ĉiuj en ordo. Unu ĉapitro finiĝas, la dua komenciĝos pli rapide ol vi sukcesos turni la paĝon. Li stariĝis kaj transdonis la nomarojn al Matvjeĵ Gromov. Li premis lian manon kaj li sentis volon ĉirkaŭbraki lin kaj en la gorgo jukis lin pro kortuŝeco.

— Decas danki, diris li raŭke, sed ni dankis al vi jam tiomfoje, ke vane mi serĉas novajn vortojn. Ĉiam, kiam ni estas embarasitaj, vi estas tie ĉi. Ni ne rajtas forgesi, ke vi estas tie ĉi, sed ni ne rajtas kutimiĝi al tio. Ion ja devas tamen fari ankaŭ ni mem.

— Vi faros, kial vi ne farus? diris Matvjeĵ Gromov ridetante larĝe. Sufiĉas, ke vi liberigu homon el subpremo, kaj li transportos montojn. Propraokule vi tion vidos.

Galčík foriris kun Gromov, Bagár rigardis lin forirantan kaj klopodis rememori, kion li volis de li kaj forgesis diri al li dum tiuj ekscito kaj rapidado.

— Ni devas redoni la tablon kaj seĝojn, diris apud li voĉo de Sidonia kaj Bagár eksentis, kiel lia sango impetas liajn vangojn. Jes, tion li volis diri, kaj forgesis. Ke Sidono kaj li, kaj ke necesas fari plej rapide ĉion, kio estas por tio bezona. Li kliniĝis antaŭen, eĉ en liaj kruroj spasmis, kiel li volis ekkuri post Galčík. Tiom forta movo ĝi estis, kvazaŭ estus revenintaj liaj jam longe pasintaj dudek jaroj.

— Atendu, mi ne komprenis al vi, li respondis embarase al Tymeš. Ripetu tion ankoraŭ foje.

— Pri tiuj bovinoj kio estos, mi demandis vin.

Antoĉjo ĵetis facile la tablon super la kapo sur dorson kaj preparadis sin por ekpaŝo. Demando de Tymeš lin haltigis. Li respondis pli frue ol Bagár.

— Ni jam demandis ilin. Ili diris, ke el la Valetto ili ne iros. La bovinoj kaj la porkoj ankaŭ. Valetto superas ĉion, jen ilia parolo. Kaj ni jam trakalkulis, ke oni povas plenumi ilian peton. Oni jam komencas diskonduki ilin al stalaj tiel, ke ĝi plej bone taŭgu. Konsilo kaj helpo bonvenantaj.

Tymeš delikate siblis tra premitaj lipoj.

— Malgrandaj infanoj ricevis novan ludilon. Plej

malbaldaŭ post du semajnoj, sed, nu, post unu semajno vi estos sataj. Mi ne estas homo ofendema. Vi povas veni eĉ pli poste kaj vi ne estos malakceptitaj.

Li gestis salute per aŭto-okulvitroj kaj ekpaŝis al domangulo, kie staris lia motociklo.

— Sagaculo, diris Antoĉjo en bruaĵn pafajn de startigata motoro. Iuj homoj estas nur nuraj sagaculoj kaj aliaj nur nur penegas. Mi ŝatus scii, ĉu ĝi estos tiel por ĉiam.

— Ni devas tion kunigi, diris Bagár, kaj tiujn nurajn nurajn sagaculojn forskrapi. Kaj ĉu vi estas sagaculo kun tiu tablo surdorse, mi ne scias.

— Ĝi estas el neta senbrideco, ekridis Antoĉjo kaj suprenĵetis la tablon sur siajn ŝultroj. Tiu ĉi epoko estas kvazaŭ farita por mi. Ĉiam okazas io nova kaj tio estas afero por mi.

Li malfermis al si per kubuto pordeton en pordego kaj trarampis tra ĝi sen meti la tablon de sur sia ŝultro.

— Ni devus porti post li tiujn seĝojn, diris Sidono kaj prenis manon de Bagár. Sed mi volas esti kun vi almenaŭ unu minuton sola.

Ili staris apud si senmove en subitaj kvieto kaj mallaŭto. La suno jam eŝtis subirinta kaj ombro de montdeklivoj kuŝiĝis sur Valetton. La pejzaĝo flustris: Pacon, ho pacon! Mi silentas al viaj sortoj kaj tamen mi vivas kun vi. Mi estas el vi kaj atendas viajn manojn. Mi floras kaj naskas por vi kaj mi estas morta sen viaj voĉoj.

Malproksime sur la dua flanko de la urbo leviĝis daŭrema ululado de la fabrika fajfilo. Kaj kiel respondo eksonis muŝvoĉa blekado de bovinoj, kiujn oni en Valetto transkondukis el unuj stalaj en aliajn.

Sur la deklivo sub Bagár kaj Sidonia aperis Vincenzo Statur kaj Venceslao Brendl. Ili pelis antaŭ si ses bovinojn kaj du bovidojn. Vincenzo Statur svingis super iliaj dorsoj vipon kaj eligadis instigajn sonojn, Venceslao Brendl havis malfermitan surtuton kaj ĉapelon ŝovitan sur nukon tiel, ke ĝi nudigis la elstarantan frunton. Li aspektis plezurigite kiel homo revenanta el gaja ekskurso. Li ridetis tra fortaj okulvitroj kaj ululis same instige kiel Vincenzo Statur.

— Jen ŝi, diris malantaŭ dorso de Bagár Antoĉjo. Mi eliris ŝin el la truo. Iru nur, sinjorino, la germanoj estas jam komplete for.

Antoĉjo gvidis edzinon Statur sub la brako kvazaŭ rezistantan fianĉinon. Ŝi elglitis finfine kaj diris:

— Do jam lasu! Jen unu frenezulo.

En ŝia voĉo sonis samtempe kolereta kaj repaciĝema tono, ŝi volis esti akirata, ŝi ĝojis pro ĉia signeto de homa intereso kaj elkoreco, ŝi, kiu kompleze disdonadis tiom multe da ambaŭ al la aliaj, kaj mem tion malmulte ricevadis. Ŝi ĉirkaŭrigardis adaptante sian kaptukon, kiu estis dumvoje glitinta sur frunton, kaj ekparolis revenante al sia kutima spitema maniero:

— La germanoj estas for kaj ni restos tie ĉi kiel paliso en barilo.

— Do vi rigardu ŝin, diris Antoĉjo. Unu fojon ŝi volas foren, ĉar la germanoj estas tie ĉi, duan fojon tial, ĉar ili tie ĉi ne estas.

La unua bovino venis supren sur la ebenajeton antaŭ la domo kaj la ceteraj ŝin sekvis. Gajigita Vincenzo Statur frapis per manplato unu hezitantan bovidon kaj ululis:

— He, patrino, mi kondukas gastojn al vi! Tiuj ĉi belulinoj iras al ni en hotelon.

Kaj tiam edzino Statur tuj komencis zorgi kaj koleri.

— Li tro pelis ilin, ili apenaŭ povas elspiri. Ĉu li ne estas frenezulo? Ankoraŭ ili iel suferos kaj estos ni la kulpaj. Malfermu pordon, knabinoj, vokis ŝi al la filinoj, kiuj aperis kun la knaboj antaŭ la domo, kaj vi buboj iru en subtegmenton por bruta faruno. Ni devas ja fari al ili bonan trinkaĵon.

— Mi iras helpi en la vilaĝo, diris Georgina kaj neatendante la respondojn ŝi traglitis preter la gepatroj kaj kuris malsupren laŭ la deklivo.

Malantaŭ la dorso de ŝia edzino, kiu pelis la bovinojn en la pordegon, Vincenzo Statur elprenis el la buŝo sian trabrulgitan estingigintan pipon kaj montrante per ĝi al ŝia edzino kompire palpebrumis al Bagár. Jen vi ŝin havas, devis tio signifi, kaj ĉiuj tion komprenis, tiun jam neniu povos eksigi el tie ĉi.

La bovidoj volis kuri flanken, sed la buboj ekkuris post ili kaj pelis ilin returnen. La bovinoj hezitis antaŭ la nekonata korto, sed poste, ĉar la malantaŭaj puŝis la antaŭajn, enmarŝis en la pordegon ĉiuj samtempe. La buboj sekvis ilin kun krio.

— Malrapide, nur malrapide, admonadis ilin Statur-edzino kaj poste turnis sin al Bagár kaj la ceteraj.

— Bele mi petas, ŝi diris, iru al ni eltrinki ion varman. Vi certe malvarmiĝis ĝis ostoj.

Ili estis tre dezirantaj eksidi por momento en ĉambro, kiun la geedzoj jam sukcesis transformi en afablan hejmon, kaj teni en malvarmaj manplatoj varmajn vandojn de poteto plenigita per sekalkafo, aŭ klini vizaĝon super vaporon elirantan el supotelero, glorigi per tia malgranda simpla festeno finon de malkvieta tago troplenigita per zorgoj kaj multaj maldolĉoj, kaj trovi kontentigon en amika babilado. Sed ĉiujn atendis ankoraŭ multe da laboro kaj ankaŭ ĉiujn alsupre en la Valetoj Andreo Kalend kun siaj KNS, Antoĉjo kaj ceteraj ankoraŭ longe ne estis finontaj. Venceslao Brendl eĉ intencis reveni al ili, ĉar homo, kiu scias labori kun ciferoj kaj pri ilia zorga ordigo, estis tie tre bezonata.

— Kaj ni kompreneble iros ankaŭ, kiam ni estas finintaj tie ĉi, turnis sin Bagár al Sidonjo. Pliaj kapoj, pliaj manoj, ĝi iros pli rapide. Ni devas sole interkonsenti pri komuna sinteno.

— Venceslao Brendl aranĝis pli zorge sian ĉapelon, ŝovitan dume tro malantaŭen, kaj ridetis kulposcie kvazaŭ li diradus: jen jam fino de petolajoj, mi ĉesas esti gaja bovinpelisto kaj refariĝas dignoplana poŝtestro kaj membro de la Administra Komisiono. Li deprenis la okulvitrojn, purigadis ilin kaj okulumante kontraŭ ore brilanta okcidento li paroladis:

— Tre ĝuste, sinjoro prezidanto, certe tre ĝuste. Estas tie efektive pli da laboro ol ni povis imagi al ni. Estas bezone fari almenaŭ provizorajn listojn de inventaroj, de korta birdaro, kaj ni komplete forgesis la grenon. Fari listojn kaj konservi, jen komplika kaj respondeplena tasko, ĝi postulas sendube vian ĉeston.

Brendl purigadis siajn okulvitrojn nekutime longe kaj palpebrumis pli forte ol alifoje, embarasigante daŭre pli profunde.

— Mi esploris la situacion, li daŭrigis, kaj mi permesis al mi proponi certan laborprocedon. Nu, ehm! Resto estas jam nura problemo pri konfido. Mi volis ja vin peti, ke vi komisiu min per kontrolo de efektivigo, kompreneble kun transpreno de ĉia respondeco, kiu el tiu grava tasko sekvas.

Bagár, sur kiun transiris embaraso de Brendl, meditis, kien la poŝtestro celas. Kaj kiel ĉiam, kiam li parolis kun Brendl, li havis impreson, ke li ĝis nun malmulte atentis tiun ĉi homon, kaj ke li malfideligis al ŝia partiana devo tial, ke li lin ankoraŭ ne akiris.

— Al vi ni povas ĉiam fidi, li diris elkore, kaj neniam ni devas peti vin dufoje. Sed kial vi volas surprizi pli ol bezone?

Brendl finfine surmetis siajn okulvitrojn, palpebrumis malantaŭ ili.

— Nepre mi ne estas tiom neprofitema, kiel vi volus sugesti al vi, diris li tusetante. Mi eĉ devas peti vin pri komplezo. Loĝejo, sinjoro prezidanto, loĝejo por mia nova kunlaborantino fraŭlino Julia Ros. Ŝi ne havus kien kuŝigi la kapon, se ni ne sendus ŝin en hotelon.

— Ĝuste, diris Bagár rugigante, ĉar li forgesis la

novan oficistaron dum la rapidado de la tago. Vi do akceptos taskon fermi la enlistigojn en la Valetoj kaj mi enloĝigos kamaradinon Ros ĉe Tietz. Ĉu taŭgas? Ĉu kontenta pri hodiaŭa tago?

Venceslao Brendl premis manon de Bagár kaj per ŝia dua mano demetis la ĉapelon.

— Dankon, li diris, kaj mi restas via ŝuldanto. Pri la hodiaŭa tago mi kompreneble kontentas eminente. Ĝi estas memorinda tago, siaspece historie signifa. Almenaŭ rilate nian urbon. Ĝi konfirmis al ni, ke forigo de germanoj estas ebla kaj ke ni povas serioze kalkuli kun ĝi. Kaj niaj rusaj amikoj nin denove, kiom foje jam, konvinkis, ke al ilia vorto kaj helpo ni povas ĉiam fidi. Mi tiras el tio personajn konkludojn, sinjoro prezidanto. Mia malnova kredo, sed ĉu la mia, ne, la kredo de niaj naciaj revivigantoj je la granda misio de Ruslando ricevas konvinkan konfirmon. Historio ja vidigis, ke devis esti alia Ruslando, tia, kian en siaj revoj vidis sole nur la plej bonaj filoj de tiu granda lando. Eĉ tio estas instrua, tre instrua, kaj oni ne povas iri preter tio ne atentante tion. Kia Ruslando estis kapabla venki pratempan malamikon kaj savi ankaŭ nin, kia Ruslando streĉas al ni helpan manon? Mi vidas kaj riverencas en estimo.

— Vi eĉ ne scias kian ĝojon mi sentas pro viaj vortoj, sinjoro Brendl, diris Sidonjo kortuŝite. Sed permesu demandon. Vi diris, ke vi faras el via ekkono konkludojn. Ĉu vi povas diri al ni kiajn?

Venceslao Brendl palpebrumis, tuŝis la okulvitrojn, sed lasis ilin sidi sur la nazo.

— Mi scias, kion vi pensas, li respondis, kiam li estis denove ektusinta. Mi klopodis ekkoni, sur kiaj principoj staras tiu nova Ruslando, kaj sinjoro via patro, fraŭlino, estis tiom afabla kaj pruntis al mi libreton. Malgrandan libreton. Laŭ ĝia stato estis videble, tra kiom da manoj ĝi trairis. Mi tralegis ĝin atente. Kaj mi diras jes. Kaj mi pensas, ke ĉiu honesta homo devas tiel respondi: Ĝuste, tiel estas. Tiu libreto nomiĝis — ehm — Komunista manifesto. Rimarkinda libreto. Mi estas leginta dum mia vivo multajn librojn. Komprenu: solula homo, librovermo, amanto de pasinta nacia gloro kaj de antikvaj solejoj. Mi tralegas libron, iras kaj meditas, por tiel diri, mi vivas kun ĝi. Kun iu mi konsentas kaj mi bonfartas, kvazaŭ mi estus renkontinta agrablan homon, kun alia mi disputas, kokkoleras, mi volus interbatigi. Iu kvazaŭ prenis mian manon kaj helpus al mi je unu paŝo pli antaŭen, kien mi volas, la alia kvazaŭ faligadus min per batoj sub miajn krurojn. Kaj nun mi demandas, kial dum mia tuta vivo ne venis al miaj okuloj tiu libreto, kiun al mi pruntis via patro, fraŭlino. Mi komprenas. Konis ĝin nur la sciantoj, en montra fenestro vi ne trovis ĝin, librovendisto kaj bibliotekisto ne proponis ĝin al vi. Ni ne rajtis ekscii, kiaj ideoj alkondukis la rusan nacion al tio, ke ĝi tiom heroe ekstaris, suferadis kaj bataladis. Mi estas profunde ofendita en profundeco de mia animo pro ĉiuj tiuj pasintaj tagoj. Estis mia rajto scii. Anstataŭ tio mi estis informata, ke bolŝevikoj mangas malgrandajn infanojn, detruas la plej noblajn valorojn kaj ĝenerale estas malamikoj de la homa gento.

Venceslao Brendl staris kun kapo iom klinita al la dekstra ŝultro kaj eksplikadis kun rektigita, ĉe pinto iom kurbiĝinta, skribista montrofringro. Sur liaj pergamenaj vangoj, ekzakte sur la vangostoj, elsaltis ruĝetaj makuloj. Li haltis en mezo de la parolo, mire ke ne en duono de vorto, kaj tuŝis embarase la okulvitrojn.

— Mi opinias, diris li senkulpige, ke mi lacigas vin per miaj babiladoj.

Bagár sentis kiel neagrablan kolizion, ke Brendl ĉesis paroli, tiom atente li aŭskultis lin. Li skuertis sian ŝultron intencante ekparoli, sed Sidonjo antaŭis.

— Kiel povis veni al vi tia penso, diris ŝi tuje. Tre ni petas vin, eldiru vian ideon.

Kaj Venceslao Brendl, sismografe sentema kiel ĉiam, surmetinte denove siajn okulvitrojn, palpebrumis malantaŭ ili kaj diris alligante al parolo de Sidonjo:

— Ĉu ŝajnas al vi, ke mi sekvas iun fiksan ideon, ke mi celas al iu difina celo per mia babilado? Sen dubo, fraŭlino. Mi volas diri, ke la libreto, kiun pruntis al mi sinjoro via patro, malfermis miajn okulojn. Ĝi klarigis al mi multon, kio min ofendadis dum tuta mia vivo, sed pri kio mi ne povis trovi konsilon. Ĝi duondiris al mi, kial al multaj homoj tie ĉi en la urbo ŝajnis, ke mi diras komunistaĵojn. Ĝi klarigis al mi, kial niaj rusaj amikoj sukcesis venki dum la plej malfacilaj kondiĉoj. Ĝi metis antaŭ al mi vicon de demandoj kaj mi dediĉadis min al ili tiom longe, ĝis mi sukcesis respondi al ili. Mi imagis al mi ekz. la ĉi tian teksfabrikon kaj mi demandis, ĉu estas ĝuste, ke ĝi fariĝu privata posedaĵo de sinjoro Dorn, aŭ ĉu estas pli bone, ke administru ĝin en intereso de ni ĉiuj tiaj homoj, kia estas sinjoro via patro, sinjoro Mareš kaj ceteraj. Mi diras, ke mi ne estas partiano de sinjoro Dorn kaj de liaj posed-instinktoj kaj ke tio, al kio mi venis en unu kazo, validas en kazoj ĉiuj.

Bagár ekĝemetis kiel homo sekvinta streĉe katenantan ludon kaj ĝisatendinta feliĉan finon, kian li deziris.

— Iam diris li nekutime mole per voĉo, el kiu estis preskaŭ malaperinta la ofta raŭkeco, kiam vi interparolis dum parkfesto kun ĉefleŭtenanto Grinjenko, mi diris al vi, ke vi metas demandojn ĝuste kaj ke vi certe mem trovos ĝustan respondon. Kaj longe antaŭe, en tago de via alveno en nian urbon, vi parolis pri tio, ke tie ĉi ni ĉiuj estos fratoj, kaj mi aldonis: aŭ kamaradoj. Vi respondis al mi, ke enhavo de tiu nocio ne estas sciata de vi. Kaj hodiaŭ?

Venceslao Brendl malkviete movis sin kvazaŭ ekzamenata studanto, tuŝis la okulvitrojn sed lasis ilin sur la nazo kaj ekrigardis decide al Bagár:

— Nobla nocio, diris li serioze kaj eĉ ne rektigis sian longan montrofingron. Mi pensas, ke mi komencas kompreni ĝian enhavon. Sed mi konjektas, ke por ĝin kompreni en la tuta profundeco, oni devus vivi — nu, ehm, kamaradece.

Li balancis la kapon kvazaŭ li mirus pri io.

— Sed kiom longe vi memoris miajn hazardajn vortojn!

— Ne ekzistas hazardaj vortoj, respondis Bagár. Ĉiu vorto, kiun ni ekparolas, naskiĝis ja en ni. Kaj nun, kiam tiom da aferoj iĝis al vi klaraj, kion vi faros? Vi staras antaŭ pordo. Ĉu vi levos la manon kaj frapetos?

— Ĝi estas grava paŝo, tro grava.

— Kaj vi estas serioza homo. Certe vi pensis pri ĝi.

— Mi pensis kaj mi demandas, ĉu mi havos sufiĉon da forteco por plenumi tion, kio el tio sekvas.

— Kiom da forto havas homo, se li estas sola? Kaj la kamaradecon vi forgesis?

— Vi pravus, diris Venceslao Brendl, kvazaŭ li mirus pri io. Mi estis sola, tro longe sola, kaj mi eĉ ne scias kial. Neniam mi insistis pri tio.

— Mi alportos al vi aliĝilon mem, diris Sidonia varme. Jen estas unu garantianto kaj tie ĉi la dua. Kaj nia patro volos ankaŭ garantii por vi. Ni lotos.

— Ĝi estas tro granda honoro por mi, diris Brendl per obtuziĝinta voĉo, tro grandan fidon vi metas en min. Mi venis homo fremda, de la unua tago vi donis al mi helpan manon. Mi neniam forgesos, mi ne povas forgesi. Mi tion portas en mi. Mi estas via.

Ili silentis ĉiuj tri. Sentoalfluo pelis ilin al si. Ĝi estis tro forta, iliaj okuloj vagis tra la pejzaĝo ĉirkaŭ ili. Sidonjo sentis, kiel malsekiĝas ŝiaj okuloj. Bagár sentis jukon en nazpinto, Brendl demetis la okulvitrojn kaj fervore ilin purigadis per blua poŝtuko.

— Strange, ekparolis li fine, kvazaŭ li meditus kaj serĉus klarigon, de la mateno mi ne povis senigi min de sento, ke tiu ĉi tago estas signifoplena en mia vivo. Kaj efektive, kiom da aferoj okazis de post la mateno, kiam aperis fraŭlino Ros ĝis tiu ĉi momento. Mi ne dubas jam. Ĝi estis efektive tago, en kiu la vivo transformiĝas en fundo. Ankoraŭ foje mi dankas vin. Estas bezone disiri. La laboro atendas. Mi dankas kaj je revido.

Li streĉis al ili sian firman manon kaj malmole premis iliajn.

— Honor' al labor'! respondis al li unu post la alia.

Li rektigis preskaŭ soldatmaniere, lia ronda dorso malkurbiĝis, ekrigardis fikse en iliajn okulojn kaj diris klare:

— Honor' al labor'!

Ili rigardis lin, kiel li foriras sur vojo kovrita per orkolora foliaro acera, ili staris unu apud la alia kaj premis manojn unu de la alia. Firmamento ankoraŭ brilis pro lumo de subirinta suno.

— Kia estas tiu fraŭlino Ros? demandis Sidonjo. Ĉu maljuna, juna, bela, malbela?

— Pri kio vi pensas, miris Bagár. Mi, ulino, havas por tio netaŭgajn okulojn. Mi dirus, ke ŝi estas proksimume tiom aĝa kiom mi. Ŝi havas regulan, sinceran mienon. Ŝi versimile estos tre energia, dirus mi. Kial vi volas tion scii?

— Kaj se Brendl enamiĝis al ŝi post la unua rigardo? Bagár ekridis.

— Kiel vi povis akiri tian ideon? diris li, kiam li finfine enspiris.

— Kaj kial ne? respondis Sidonjo preskaŭ ofendita. Vi ja vidas mem, kia bona homo li estas. Mi dezirus tion al li. Mi dezirus hodiaŭ, ke la mondo estu plena je enamiĝintaj paroj, kiuj preparas sin por edziĝo kiel ni. Ĉu ni estas enamiĝintaj aŭ ne?

— Kio koncernas min, ĝi estas nepre klara, respondis Bagár.

— Do vidu, diris Sidonia venke kaj alpremis sin al li.

Ili iris supren al la ŝoseo tenante siajn manojn. En vojkurbiĝo eksonis klaksono. Ili haltis unu paŝon sub fosajo por ne esti makulitaj per koto. Dorn-aŭto preterkuris sen malgrandigi la rapidecon. Sidis en ĝi sole Dorn kaj lia edzino.

— Ĝentilaj ili ne estas, diris Sidonia

Bagár skugetis la ŝultrojn.

— Ni ne rajtas esti maljustaj al ili. Pasaĝeron ili ne veturigis, jes, sed lokon ili eble ankaŭ ne havis. Kaj ni iros pli bele kune piede ol se ni veturus kun ili.

Ĉapitro 35-a el la romano „Ekmarŝo“
riĉevinta la grandan ŝtatan premion 1951
Tradukis S. K.

Propagandajn afiŝetojn en formato A 5 eldonis nia grupo en Opava. Ili estas belaj, kvarkoloraj, tre bona helpilo en aŭtuna propagando. Mendu ilin ĉe la Asocio po 1.50.

D o p o r u ĉ u j e m e

SLOVAKA ESPERANTISTO

měsíční revue slovenských esperantistů. Pro členy Svazu snížené předplatné 70 Kčs, předplatí-li si prostřednictvím Svazu.

Použijte bílonožičky, kterou vyplňte č. Č-9602 Svaz esperantistů ČSR Praha. Označte, že částka 70 Kčs je pro S. E.

La Ĉeĥoslovakano kulturala delegitaro, kiun sendis nia registaro al Ĉinio, pridonacis la Ĉina Esperanto-Ligo en Pekingo interalie per du verkoj, pri kiuj ni jam faris menciojn (sur paĝo 41 de nia gazeto) kaj pri kiuj iom pli detale raportis nia kolego „El Popola Ĉinio“ (en sia nro 1/1951).

Estas la 114-paĝa „Ĉe-ko-ŝi-gu-hŝian“ (Elektitaj poemoj de Ĉeĥoslovakio) kaj 68-paĝa la „Ĉe-ko-hŝiao-suo-hŝian“ (Elektitaj noveloj de Ĉeĥoslovakio), ambaŭ tradukitaj el Ĉeĥoslovaka Antologio en ĉinan lingvon de Kuai-Huan kaj eldonitaj de Sanghaja kooperativa eldonejo.

Tiuj du libroj venis nun en niajn manojn. En la unua ni trovas ĉinan tradukon de sekvantaj poemoj: Kantoj de la sklavo (kanto IV-a, VII-a kaj VIII-a) de

Svatopluk Ĉeĥ
Printempo venos de Josef Václav Sládek
Al slovakoj! kaj Al la larmoj! de Svetozar Hurban Vajanský

Al la patrineto kaj Nia horloĝo de Jan Neruda
Perdita paradizo de J. S. Machar
Versoj de Karel Toman
En fenestro de arestejo de Laco Novomeský
Nostalgio de Emil B. Lukáč
Nekonata soldato de František Halas
Karboministo kaj Maryčka Magdon de Petr Bezruč
La violono de l'ĉigano de Jaroslav Vrchlický
Sur la strato de Janko Jesenský
Balado pri nenaskita infano de Jiří Wolker

Aldonita estas traduko de ĉeĥa popola kanto „Alaŭdeto“ laŭ la esperanta teksto de F. Vl. Lorenz, aperinta en Fundamenta Krestomatio.

La dua libreto enhavas en ĉina lingvo la novelojn:
Li estis fripono de Jan Neruda
Maria Terezia-ordeno de J. S. Machar
Rompebla feliĉo de Fráňa Šrámek
Malsato de František Langer
Patrino de Hana Gregorová
Renkonto de Jozef Gregor Tajovský
„Mamma mia“ de Ján Hrušovský
Pri kamentubisto de Jiří Wolker
En ferofabrikejo de Peter Jilemnický

Ĉe la fino de la libro estas kelkaj notoj pri la aŭtoroj de la prezentitaj noveloj.

Ni konstatas kun admiro, kun kia lerto niaj ĉinaj amikoj sciis elekti la tradukotajn pecojn. Ni ne dubas, ke por ĉinaj legantoj ĉiu el la verkoj prezentas agrablan kaj valoran tuton.

Estas interese rimarki, ke ambaŭ poemojn de Bezruč (Karboministo kaj Maryčka Magdon) kaj la Nekonatan soldaton de Halas tradukis en ĉinan lingvon ankaŭ nia amiko Li-Laŭjon por la poemkolekto „La juĝo“, aperinta en Tientsin (vidu pĝ 16 de „Esperantista“). La noveloj: Malsato de Langer kaj Pri kamentubisto de Wolker estis tradukitaj el Ĉeĥoslovaka Antologio pasintjare en lingvon japanan.

Laŭ la deklaro de Sen Jen-ping, ĉina ministro de kulturaj aferoj — fama verkisto verkanta sub nomo Mao-Dun — Esperanto estas uzata vaste por konatigo de ĉeĥa kaj slovaka literaturoj al ĉina popolo. La nunaj du verkoj kun tiu de Li-Laŭjon estas valoraj pruvoj pri tio.

Ĉinaj esperantistoj akceptu nian sinceran dankon pro la bona laboro, kiun ilin faris en intereso de proksimigo de niaj ambaŭ kulturoj kaj por la valoraj dokumentoj pri uzo de internacia lingvo en la praktiko. Ĉinoj scias uzi Esperanton.

Oĝa Ginz.

Ho, patrin' —
al via man' se venos ĉi leter',
indulgu ĝin —
en fremda land' timigas eĉ la ver',
sopiras mi al via mola sin',
aĥ, tristis kor' — — —
mi scias ja: vi ploris pro filin',
senmove sidis en malfrua nokta hor',
atendis vane min — — —
Silentas id',
se batas en promes' atenda kor'.
Nun ĉio for — perdiĝis ie rid',
eĉ sonĝo estas nur dolor'.

Li trovis min en dolĉa land',
en kiu rajtas tenti sens',
tra kiu kuras varma kant',
aĥ varma kant' — kaj dormas pens'.
Mortigis varm', ebri', sopir'
pri vi memoron en la kor'.
Patrino estis vi, li estis vir' —
ne larmis mi pro via plor'.
Dum vi atendis la filinon mute,
ridetis mi en dolĉa sven',
pri la patrin' forgesis tute,
ĉar lia nomo eĥis tra kurten'.
En mia kor' avaris riĉ',
mi lernis aŭdi — karulin' —
kaj tremi pro feliĉ'
en simpla fraz': mi amas vin.

Ne kulpas mi pri tio,
ke la amo fortas pli ol homa kor'.
Post la vekig' el sentebrio
al ni ne restas pli ol kapdolor'.
En dolĉa land' mi perdis lin —
kaj ne demandu la kialon.
Por plori en patrino sin'
revenas mi en vian valon.
Mi kion diru — mutas lang' — — —
Ne estas ja batalo por la in'.
Veneno restis en la sang'
kaj mi revenas al patrin'.

Sabate do en la maten'
denove ni ja vidis nin.
Akceptu idon ĉe la ven'
kaj la riproĉ' ne trafu min.
En dolĉo de l'patrina ben'
infan' mi volas iĝi — — —
Ne, ploron ne — en via pren'
mi lernos kutimiĝi.

Eva Suchardová

Uspořádejte v podzimní sezóně kurs esperanta v dohodě s místní Osvětovou besedou nebo s kulturním klubem ROH!

Propagační materiál (letáky, plakáty, učebné texty) objednejte si u Svazu!

Každý kurs nám hláste!

KRONIKO ENLANDA

Nia Esperantista Junularo laboras organizite. Grava evento en tiu ĉi sfero estis fondo de junularo en Praha kiel sekcio de E. K. la 20-an de aprilo 1950. Ĝi posedas nun propran klubejon el pluraj ĉambroj (en Praha XII, Římská 35, telefono 317.24), kiu estas malfermita ĉiutage. Vizitas ĝin ĉiutage minimume 5 personoj, jaŭdon, kiam estas kunvenoj, meznombro 10—12 personoj. Okaze de kursaro en Rožnov p. R. kunvenis la 22. VII. junulara laborkonferenco. Raportas pri ĝi numero 8/9 de la bulteno „Vokas ĵin Praha“, kiu represas nomaron de 80 ĉeestintoj. Ni represas el ĝi liston de junularaj delegitoj kaj tiujn raportojn pri agado en diversaj lokoj, pri kiuj ne estis ankoraŭ raportite. Ni enmetas tiujn sciigojn en Lokajn informojn, ĉar tie ili estas plej facile troveblaj.

Faldprospekto Bratislava aperis fare de Slovakotour (Bratislava, Reduta), 10 paĝoj de leporelo-formato, kun belaj bildoj kaj tre taŭga teksto en tre bona lingvaĵo. Estas jam la dua esperantlingva prospekto pri la slovaka ĉefurbo, kiun Slovakotour eldonis. Dankon kaj gratulon!

Tria Somera Kursaro en Rožnov p. Radh. 15.—28. Julio 1951. Partoprenis ĝin 104 kursanoj, entute 115 personoj kun la instruistoj kaj familianoj. La kurson por komencantoj partoprenis 40 p., instruis Vlad. Slaný el Ostrava laŭ la lernolibro de Ing. Krajc adaptita al parola metodo; la kurson konversacian vizitis 45 p., instruis en ĝi Ing. Krajc el České Budějovice; la kurson por kandidatoj de la ekzameno partoprenis 19 p., por ili prelegis Rud. Hromada pri la gramatiko, kaj Jos. Vondroušek el Brno pri la historio kaj literaturo. Al la ekzamenoj aliĝis 16 p. (unuagrada) kaj 10 p. (duagrada) (vidu raporton aliloke).

La kursanoj venis el 45 lokoj ĉeĥaj kaj slovakaĵ, el pluraj lokoj venis tutaj kolektivoj de nia junularo, kiuj tre sukcese kontribuis al la ĉiuvesperaj programoj, okazantaj en speciala hotela salono disponigita al la esperantistoj. Plene esperantan programon prezentis junularo de Brno, gvidate de F-ino Drah. Chlubnová, kiu mem emimente deklamis. Esperantajn kantojn kantis ĥoroj de diverslokaĵ junularaj grupoj. Muzikan parton de la programoj plenigis S-o Miroslav Tyrála, membro de la Ostrava - Filharmonio, S-ro M. Dumbrovský el Háj u Opavy, S-ino M. Bartoňová el Olomouc. Teatraĵojn gvidis S-o Kyselý el Ostrava. La Junularo de Ostrava instalas radio-gramofon kaj aŭdigis danc-muzikon postprograman.

Dimanĉe la 22-an de julio venis al Rožnov vizite samideanoj el Olomouc (21), per speciala aŭtobuso el Gottwaldov-Otrokvice (25), plue el Ostrava, Brno, Praha. Tiun tagon estis malfermita la Esperanto-ekspozicio dutaga, kiun vizitis entute 300 p. La malfermon partoprenis reprezentantoj de la Loka Nacia Komitato. Posttagmeze okazis labora kunsido de la junularo esperantista.

La vetero estis favora la unuan semajnon kaj tiam la duontaga ekskurso al la lago ĉe la riverbarajo de Bystřička plene sukcesis. Malpli la tuttaga ekskurso, marde la 24-an, al monto Radhošť, kie oni marŝis en blanka novembro nebulo kaj malvarma pluveto. Tio tamen ne difektis la bonan humoron de la kursanoj, kiuj plejparte apartenis al la junularo.

Pri la administra flanko zorgis S-ino Marie Skarupová el Ostrava kaj S-o Vlad. Slaný, regeranto de Ostrava, pri la amuzaj programoj S-o Dr. Kolečvara el Ostrava kun aro de siaj diligentaj kunlaborantoj.

Entute la Tria Kursaro en Rožnov pod Radh. estis ege sukcesa. La partoprenantoj sciis dividi la tempon inter la lernado kaj amuzado kaj disirante ili ĉiuj vokis „Ĝis la revido en Rožnov en 1952!“ — into.

Ekzamena Komisiono kunsidis en Rožnov p. R. la 27-an kaj 28-an de julio. La ekzamena senato konsistis el Rud. Hromada, prezidanta, Ota Ginz, Ing. J. Krajc, Josef Vondroušek. Prezentis sin por ekzameno unuagrada 16 kandidatoj por duagrada 10 kandidatoj.

Diplomon pri lingva scio de Esperanto ricevis: Lad. Adánek el Poruba u Sv., Josef Cink el Albrechtice, Frant. Fara el Bezno, Alois Herold el Ostrava-Hulváky, Bohumír Horák el Brno, Jan Lukeš el Plzeň, Luboš Mokryš el Sedliště, Milan Neubeler el Poprad, Gustav Niemczyk el Oldřichovice ĉe Třinec, Jaroslav Paclt el Jablonné, Anna Roubíčková el Poprad, Milada Strakošová el Ostrava, Jan Werner el Lanškroun, Ludmila Zapletalová el Pardubice, Olga Závorková el Most.

Diplomon pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis sekvantaj gesamideanoj (en krampoj estas temo de la hejma tasko):

Josef Čermák, seruristo, frekventinto de la industria lernejo maŝinista, el Ostrava (Maŝino, helpanto de la homo).

Drahomíra Chlubnová, oficistino en Brno (Konciza enhavo de la libro de Mirko Jelušič—Ivo Rotkovič: Cezaro)

Marie Jarmarová, mastrumantino en Olomouc (La interna ideo de Esperanto)

Anna Milatová, oficistino en Třinec (Signifo de la metalurgio por la Kvinjara Plano)

Vlastimil Novobilský, studento en Opava (El historio de Opava)

Miloslav Racek, sukerajisto en Plzeň (El la vivo de Zamenhof)

Linhart Rýznar, estro de muelejo en Čtyřicet Lánů, p. Svitavy (La nutro-problemo de la mondo)

Věra Sukačová, oficistino en Třebovice (Junulara movado en Ostrava)

Miroslav Tyrála, faka instruisto de muziko en Ostrava (Muziko en la homa vivo)

Zdeněk Závodný, studento en Lhotka (Letero al fremda amiko).

Pri la unuagrada ekzameno estis donitaj notoj 4 bonege, 6 tre bone, 5 bone. Pri la duagrada 4 eminente, 5 tre bone, 1 bone kapabla.

Ĉiuj sukcesintoj akceptu nian gratulon kaj dankon pro sia sindediĉo al la lingvaĵo studoj.

Somera Kolegio de Esperanto en Doksy okazis la 28-an de julio ĝis 11-an de aŭgusto jam la sesan fojon. Aliĝis 151 studentoj, inter ili 26 el Slovakio; kun la instruistoj kaj gastoj ĉeestis sume 165 p. Ili estis instruataj en 6 klasoj: A elementa Ĉseh-metoda (du paralelaj), B progresanta, C konversacia, D ekzerca por Ĉseh-metodaj instruistoj, E oratora — tradukista, F seminario por progresintoj. Krome okazis ciklo de tri esperantlingvaj prelegoj po du horoj: Novaj libroj en Esperanto (Rud. Hromada, 8. VIII.). Lego kaj diskuto el la dua ĉapitro de Ŝtato kaj revolucio de Lenin tradukita de V. Demidjuk (Dr Stan. Kamarýt, 9. VIII.) kaj Esperanto-lingvo vivanta (Karolo Pič, 10. VIII.). Instruado okazis en klasejoj de la meza lernejo sur la placo je la 8—12 horo, ekzercoj kaj instrukcioj estis donataj ĉe la lago aŭ en klasejoj posttagmeze je la 14-a aŭ je la 17-a. Ankaŭ ekskurso al fiŝlago Břehyně la 10-an de aŭg. estis uzita por prelegoj de oratora kurso kaj pri vivo de Zamenhof. Direktoro de la kolegio estis Dr Aug. Pitlik kaj krom li instruis Josef Friedrich, Rudolf Hromada, Dr Stan. Kamarýt, Prof. Josef Kožený, Ant. Slanina, Magda Seppová, Karel Šolc, Václav Špūr, Josef Vitek. La ekonomian administradon estris V. Špūr, la distran fakon Ant. Slanina, la vendejon Fr. Pýtloun.

Ĉiutage aperadis po 4 paĝoj ciklostilita informa, instrua kaj amuza bulteno de SKE de Doksy Verda

Voĉo redaktata de Ant. Slanina helpata de J. Vitek, M. Seppová, J. Kožený. Tiu ĉi tagjurnalo, unikaĵo inter esp. gazetaro, estis legata de ĉiuj kolegianoj kun granda fervoro, ĉar ĝi ĉiam estis aktuala kaj ofte enhavis bonajn spritaĵojn.

Interkonatiĝa vespero okazis la 28-an de julio je la 21-a horo en salono ĉe Jelen prezidata de V. Špŭr. Venis al ĝi reprezentanto de Loka Nacia Komitato ĝia vicprezidanto, kiu reprezentis ankaŭ Klerigan Kunularon (Osvětová beseda) s-ro Slavík kaj du reprezentantoj de distrikta komitato de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio (KPĈ) s-roj Josef Banas kaj Pavel Mičík. Ĉiuj tri alparolis la kunvenon. La unua citis el Lenin principon ĉiam apliki vidmanieron de la interklasa batalo, la dua insistis pri devo neniam laciĝi en vikleco kaj uzi por ĝi ankaŭ Esperanton, la tria s-ro P. Mičík, sekretario de Kultprop diris:

„En nomo de distrikta Komitato de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio en Doksy mi deziras al via kursaro multan sukceson kaj mi kredas, ke vi plene uzos tiun ĉi okazon, por ke vi pliprofundigu viajn sciojn por pli sukcesa kaj pli rapida marŝo de nia popoldemokratia respubliko sub protekto de USSR al masonado de nova socia ordo.“

„Via kursaro, via lernado estu gvidata kaj inspirata per ideo de batalo por konstanta mondpaco. Kondukate de nia glora Partio KPĈ kaj gvidate de nia amata prezidento kamarado Kl. Gottwald ni sukcese plenumas taskojn de la kvinjara plano. Laboristoj en fabrikoj transpaŝas, laŭ maniero de socialita konkursado, la normojn, ĉar ili konscias, ke ili estas mastroj en propra entrepreno kaj ke iliaj laborrezultoj respeguliĝas en plialtigo de vivnivelo de nia laboranta popolo. Miloj da terkulturistoj etaj kaj mezaj komprenas, ke ili ne povas halti en historia evoluo de nia lando kaj ili kolektive mastrumas sur bazo de spertoj el Sovetio sur kunigitaj kampegoj helpe de plej modernaj maŝinoj, kiujn liveris al ni Sovetio. Per helpo de la laborista klaso ni kreis novan, pli bonan, vivon de niaj etaj kaj mezaj kampistoj. Ni kreas novan vilaĝon. Jam 7877 Unuecaj Terkulturistaj Kooperativoj montras, kia transformiĝo en nia vilaĝo okazis.“

„Spertoj instruas, ke la klasmalamiko kaj la burĝaro ne rezignos pri sia potencoperdo. Ili klopodas per ĉiuj rimedoj, subtenate de imperialistoj, bremsi nian evoluon al socialismo. Ili klopodas timigi nin per krimbruligoj, embuskado, murdoj. Imperialistoj klopodas estigi novan militbrulegon.“ — — —

„Despli elstaras aranĝo de tiu ĉi kursaro, kies celo estas plifirmigi kaj pliprofundigi reciprokan kompreniĝon inter ĉiuj progresemaj civitanoj de ĉiuj landoj. Esperanto signifas por vi ŝlosilon por sukcesoj de nia lando kaj de nia laborista klaso, rezultojn, kiujn akiris niaj nacioj sub protekto de USSR kaj de amata Stalin. Helpe de Esperanto vi povas kaj devas informi ĉiujn en la tuta mondo, kiamaniere ĉe ni regas kaj vivas laborista klaso sen kapitalistoj, bankistoj, uzinposedantoj.“

„Vi ĉiuj havas la povon kaj la devon montri, kiamaniere povas kaj devas laboristaj klasoj de ceteraj subpremataj nacio unuigitaj en Antlantika Pakto kaj en Pacifika Pakto forjeti sklavkatenojn kaj iĝi liberaj homoj, kiel en USSR, ĉe ni, kaj en ceteraj popoldemokratiaj landoj.“

„Multaj el vi korespondas kun laboristoj kaj kolĥozanoj en USSR. Uzu la eblecojn kaj transportu spertojn ricevitajn en niajn entreprenojn kaj niajn vilaĝojn, organizu kunestojn kaj prelegojn kun sturmuligoj kaj anoj de Unuecaj Terkulturistaj Kooperativoj.“ — — —

„Vian scion de Esperanto uzu por daŭre pli intensa batalo por la paco. Informu ĉiun pri niaj sukcesoj. Sed neniam forgesu la viklecon kaj singardemon. Ne forgesu, ke en la internacia organizajon de Esperanto ŝtelŝovis sin multaj malamikoj de la progreso kaj paco.

Ne ĉiu ano de tiu organizo, precipe inter tiuj starantaj sub influo de imperialistoj, pensas siajn deklarojn pri la paco sincere. Tial neniam forgesu devon malkaŝi perfidon kaj tiujn individuojn, kiuj volus domaĝi al USSR, al niaj nacioj kaj al popoldemokratioj.“

„Tial mi ankoraŭ foje deziras al via lernigado multan prosperon kaj mi vokas vin ĉiujn al batalo por la paco sub gvido de granda Stalin. Honor' al labor!“

Ĉiuj tiuj diskursoj estis akceptitaj kun brua aplaŭdo.

Direktoro de la Kolegio dr. Pitlík skizis ĝisnunajn rezultojn de kolegiaj laboroj kaj prezentis ĉiujn instruistojn. Ili diris siajn salutojn al la lernantoj. V. Špŭr donis detalajn klarigojn pri administraj aferoj.

La 19-an de aŭgusto je la 12-a horo okazis ĉeflingva prelego de asocia prez. Adolf Malík: Pri problemaro de nova Ĉinio. Aŭskultis ĝin ĉiuj kolegianoj tre atente.

Sabaton la 11. VIII. estis la kolegia laboro finita per skriba ekzameno, post ĝi sekvis adiaŭa kunveno de ĉiuj kolegianoj, en kiu la instruistoj adiaŭis siajn lernantojn kaj ĉiuj kun kontento aŭdis konfirmon, ke Kolegio okazos ankaŭ en venonta jaro.

La posttagmezaĵaj kaj vesperaj programoj denove kreis la Doksan atmosferon de amikeco kaj samideaneeco.

Improvizitaj programoj okazis lundon la 30. VII. je la 16-a kaj la 3. VIII. je la 20,30 h. La reĝisoro de programoj Ant. Slanina ĉiam sukcesis aperigi sur scenejo kolegianojn rikoltontajn bruaĵojn: E. Suchardová, Kožený, Hanako, Rokycana, Vitek, Kissová, Sedín kaj aliajn. Jaŭdon la 2. VIII. vespere oni veturis per motorboato al Staré Splavy kaj post duonhora kunesto en surborda restoracio oni marŝis piede al Doksy kantante. La promeno estis tre agrabla por ĉiuj.

Tradicia ekskurso al kastelo Bezděz okazis la 1-an de aŭgusto posttagmeze; post vizito de la kastelo ĉiuj revenis al gastejo sub la kastelo, kie la programo daŭrigis per vespermanĝo, dancado kaj reveno en aŭtobusoj noktomeze. Ankaŭ aŭtobusa ekskurso al Kokořín la 9. VIII. posttagmeze kontentigis ĉiujn partoprenintojn.

Dimanĉa ekskurso en tri aŭtobusoj estis impona. Oni forveturis la 5-an de aŭgusto je la 5,15 horo matena. Antaŭis la forveturon je la 4,30 sankta meso en la preĝejo kun kantoj kaj preĝoj esperantlingvaj. La aŭtobusoj veturis al Ústí n. Lab., kie ni transiris al ŝipo veturiganta nin sur Elbo tra la pitoreska valo ĝis Hřensko. La panoramoj estas ravigaj. Krome muzikis sur la ŝipo orkestro kaj oni povis danci. En Hřensko estis tagmanĝo en hotelo Bílý Lev, poste sekvis aŭtobusa veturado al piedo de Pravčická Brána, kiun ĉiuj suprengrimpis kaj reveninte veturis aŭtobuse al valo de rivereto Kamenice, laŭiris ĝin piede kaj estis transportitaj per boatoj tra la Ďuriš-interkrutejo. Post preskaŭ duhora marŝo ĉiuj atingis la aŭtobusojn ĉe la haveno en Hřensko. Ili revenis al Doksy je la 20-a horo. La aranĝo de la ekskurso estis tre agrabla; ni danku gvidinton s-on Vitek, kiu zorgis pri plenumo de la programoj kaj atingo de fiksitaj horaroj kaj de s-o Pytloun, kiu veturigis provizor de jahurtoj kaj de aliaj manĝeblaĵoj.

Unu malagrabra akcidento okazis. S-ino Vlasta Hošková el Plzeň B-kursanino, dum malsuprenirado sur la herbejo al la Kamenice-valo glitis kaj rompiĝis ŝiaj ambaŭ tibiostoj kaj ŝirigis unu tendeno. Ĉeestantaj Dro Izák kaj fratulino el Ruĝa Kruco en Brno Borská provizore bandaĝis la kruron kaj transportigis ŝin al malsanulejo en Děčín. Estos bezone, ke s-ino Hošková kuŝu tie ĉirkaŭ ses semajnojn. Vizitis ŝin en la malsanulejo la 8. VIII. ses gekursanoj. Ŝi akceptis la akcidenton kun sportista kuraĝo. Ŝi ne plendas, ŝi estas nur scivola, ĉu ŝi kapablos skiadi same bone kiel antaŭ la akcidento.

Samideanino Hošková akceptu niajn salutojn ankaŭ pro tiu ĉi ŝin honoriga sinteno en situacio nefavora.

La tradicia Venecia nokto sur la Mácha-lago la 8. VIII. kunvenigis ĉiujn kursanojn kaj multajn gastojn. La unua kanonpafo anoncis komencan de boatpromenado, la dua bruligon de torĉoj kaj de lampiojn, koncerton de muziko sur la ĉefa ŝipo, kanton de operkantistino Věra Borská, artfajraĵojn piroteknikistajn. La tria kanonpafo signifis revenon en la strandan restoracion, kie oni dancis ĝis noktomezo.

Vespero de sorĉoj de samideano Rýznar la 4-an de aŭg. en strandara restoracio kontentigis ĉiujn same pro la prezentitaj artifikajoj kiel pro la ĉarmeco de la prezentmaniero. Esperantista amatora sorĉisto devis sorĉi en kondiĉoj pli ol primitivaj. Tamen la rezulto ne diferencis de tiu sur luksaj scenejoj.

Matĉo inter ŝakista deko de SEKD kontraŭ ŝakistoj de la ŝakista grupo de Doksaj Komunalaj Entreprenoj finiĝis per venko de ŝakistoj esperantistaj 5½ kontraŭ 4½ (7. VIII.).

Maska baĵo la 10. VIII. estis gaja fino de amuzadoj.

Vespero „Doksy en poemoj kaj kanto“ reĝisorata de Dro Pitlík la 31-an de julio prezentis 21 poemojn de 9 aŭtoroj, kiuj estis inspiritaj de Doksy-regiono aŭ de vivo en la kolegio. Al tri el tiuj ĉi estis komponita muziko. La aŭtoroj estas Dr Pitlík, K. Pič, E. Urbanová, L. Rejthárková k. a. Krom tiuj verkoj estis deklamitaj versoj de Fráňa Šrámek, Vítězslav Nezval, K. M. Wallo, Ronsard. Deklamis krom dr. Pitlík, kiu legis proprajn versaĵojn, Suchardová, Rejthárková, Kožený.

Koncerto de profesoro Hršel la 6. VIII. prezentis koncerte luditajn specimenojn de violona klasika muziko. Alternis dek'amoj de E. Suchardová. Piane akompanis H. Kulová, kiu krome kantis du kantojn de Smetana.

Solena koncerto la 9-an de aŭgusto en salono ĉe Jelen estis grava artista evento. Prezentis sin kantista ĥoro de B-kursanoj gvidata de s-ino M. Seppová, estis deklamitaj de prof. Kožený kaj de Eva Suchardová en ĉeĥa originalo aŭ en esperantlingva traduko poemoj de Šrámek, Nezval, Tagore, Puŝkin (la letero de Tatjana en rusa originalo deklamita de Věra Kožená, en kancasay-traduko de E. Suchardová), prof. Hršel violonludis, operkantistino Věra Borská kantis klasikajn ariojn inter ili la ĉiam ekscitan Carmen-kanton, Květa Kožená pianoludis, samidenino Kísová kantis kantojn slovakajn sekvatajn de granda aplaŭdo. Nepran laŭdon meritas ankaŭ s-o Ph. Mr. Ondrej Hoffman el Lipt. Sv. Mikuláš pro sia oferema kaj sperta pianoakompano.

En la fino de la koncerto prezentis direktoro Dr Pitlík rezulton de la IV-aj Floraj Ludoj. Premiojn ricevis 1. Pro originalaj poemoj: Niko Ĉekal (Sub verdan stelon!). El Ĥoubraŭská-Urbanová (Nimfoj kaj Fatala amatino). M. Kleinbauerová (Kial). Jiří Kofínek (Disko invitas). K. Pič (Ridindaj tumultoj. Kurso legolibro, Epltafo), L. Rejthárková (Ni ree doksas), E. Suchardová (Letero al malbroksimo). 2. Pro traduko de ĉeĥa poemo: Jiří Kofínek (Poŝa tuko de V. Nezval). 3. Pro originala esp. prozaĵo: Aug. Ĉambál (Revoj de Ĥinfano). 4. Pro muziko al originala esp. poemo: Št. Urban (La voĉo de Zamenhof).

Manifestaciĝ pacokonzerto de klasika muziko en la dekana preĝejo la 7-an de aŭgusto vespere estis la plej altnivela el artismaj entreprenoj de la Kolegio. Aktive partoprenis operkantistino Věra Borská (Brno), arĉa kvarteto de la I-a violonisto Miroslav Tyrála (Ostrava), II-a violonisto Ladislav Kafka (Bakov), aldoviolonisto JUDr Josef Fousek (Přelouč), violonĉelisto MUDr Frant. Vaněk (Karlovy Varv). Kantista ĥoro de SEKD kondukata de JUDr J. Fousek. La Programo estis jena: 1. Seb. Bach: Ario. 2. Dvořák: Bibliaj kantoj. Brahms: Lulkanto. Händel: Largo. 3. Bériot: Adaĉo. 4. Mozart: Ave Verum (en esp. traduko de Dr Fousek). 5. Schubert: Kvarteto Es-dur. 6. Gounod: Ave Maria. Caro

mia ben. 7. Čajkovskij: Andante Cantabile. Dvořák: Bonan nokton, opus 16. La multnombra ĉeestantaro silente kaj profunde kortuŝita aŭkultadis pie la muzikon kaj kantojn el la ĥorejo. Sub potenca influo disiradis la publiko sub la ĉielon en varma vespero.

Ekzamena komisiono kunsidis en Doksy la 11-an de aŭgusto. La senato konsistis el Dr Stán. Kamarýt prezidanta, Rudolf Hromada, prof. Josef Kožený, Dr Aug. Pitlík. Prezentis sin al la ekzameno unuagrada 8 kandidatoj, al la duagrada du. La rezulto estas jena:

Diplomon pri lingva scio ricevis Zdeňka Dobiášová el Brno, JUDr Bohuslav Jakerle el Liberec, Anna Knollová el Brno, Miloš Slabihoud el Vejprty, František Strumínský el Ostrava, Jaroslav Suchánek el Chvalkovice, Karel Šmouch el Ostrava, Anna Veselá el Rokycany.

Diplomon pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis:

Augustin Ĉambál, faka instruisto en metia lernejo en Martin. Kiel hejman taskon li ellaboris: „Edukado de metilernantoj en kapitalismo kaj en socialismo.“

MUDr Ludovít Izák, kuracisto specialisto en Martin. Kiel hejman taskon la senato akceptis liajn artikolojn „Kio okazas en Ĉeĥoslovakio“ aperintajn en „Esperantisto Slovaka“.

Ĉe la unuagrada ekzamenoj estis donitaj notoj 4 bonege, 2 tre bone, 2 bone. Ĉe la duagrada 1 eminente, 1 tre bone kapabla.

La ekzamenitoj akceptu krom la gratulo pri sukceso sincere dancon pro ilia sindediĉo al lingvaj studoj.

De Ĉina Esperanto-Ligo (P. O. Kesto 77 Peking) ni ricevis leteron el 9-an de julio, en kiu estas dirite, ke nia organo Esperantista estas entuziasme legata de ĉinaj esperantistoj ne malpli ol Esperanto-Servo. Ni tre ĝojas pro kontenteco de niaj ĉinaj amikoj pri niaj du organoj kaj ni salutas ilin kama-radece.

Japanaj gazetoj enpresas nun sufiĉe ofte artikolojn kaj bildojn el Ĉeĥoslovakio, kiujn ili ricevas per esperantlingva korespondado de nia membro Rud. Burda en Plzeň. Bildojn kaj raportojn pri la senditaj kestetoj ni vidis en la japana „Ruĝa Helpo“ n-ro 114, en Rodosya (Metallaboristo) n-ro 31, Organo de Tutmonda Federacio de Sindikataj Unioj (WFTU) n-ro 321. Sed oni povas legi ankaŭ pri aliaj temoj, ekz. pri unuamaja festo en Plzeň en Rodosya n-ro 36. Temas ĉiam pri progresemaj japanaj ĵurnaloj batalantaj por la paco sur bazo de la Stokholma rezolucio.

En ĉeĥaj ĵurnaloj aperis en junio-aŭgusto pluraj artikoloj pri rezultoj de korespondado de niaj samideanoj en Plzeň kun la japanaj pacbatalantoj persekutataj de la reakcia Joŝida-registaro. Precipe ĵurnalo de Revolucia sindikata movado „Práce“ kaj semajna gazeto de Škoda-uzinoj en Plzeň „Škodovák“ enpresis tiajn artikolojn verkitajn plejparte de s-o R. Burda. Sed ankaŭ Tatrovák en Kopřivnice kaj Pravda en Plzeň.

Tradukoj el Esperanto en slovakaj gazetoj. Dum lastaj monatoj aperis en slovakaj gazetoj pluraj artikoloj tradukitaj el Esperanto. Semajna revuo „Život“ (24. XII. 1950) enhavis en sia kristnaska numero artikolon Biely černoch (Blanka negro) de Walther White; uzina gazeto „Naše zrkadlo“ alportis (2. VI. 1951) kontribuojn Nórsko na ceste k vojne (Norvegujo survoje al la milito), kiu origine aperis en „La Esperantista Laboristo“. El ĉina monatgazeto „El Popola Ĉinio“ tradukitan artikolon Tajvan ĉaká na oslobodenie (Tajvan atendas liberigon) (aŭtoro Vang-Ĉaŭ-caj) ni trovis en „Naše zrkadlo“ la 2-an de decembro 1950. La sama artikolo aperis ankaŭ en revuo „Slovenský rozhlas“ sub la titolo „Tajvan“ (numero 51 el 18-24. XII. 1950). Krome estis publikigitaj tradukoj Záhadné svetlá (Misteraj lumoj) (de Ivan T. Sanderson), „Niils“ (de L. Szekely) kaj kelkaj mallongaj informoj pri esp. mo-

vado. La menciitajn artikolojn tradukis kaj al la gazetoj sendis s-ano Ján Lamačka.

„Církevné listy“, (Lipt. Sv. Mikuláš) publikigis la 5-an de majo ampleksan artikolon: Religio en post-milita Japanio (Náboženstvo v povojnovom Japonsku) kun noto, ke ĝin tradukis EVT laŭ esperantlingva manuskripto.

Esperanto-muzeo en Trenčín, pri kies inaŭguro ni raportis antaŭ nelonge, estis likvidita, ĉar oficiala komisiono por reorganizo kaj specialigo de muzeoj eksigis ĉion, kio estis ester la kadro de loka, distrikta aŭ regiona intereso en la regiono, por kiu la muzeo estas destinita. (Laŭ Esperantisto Slovaka el majo 1951.)

Kultura Revuo de Komisiitejo por informoj en Bratislava estis ĉesigita, ĉar el nia lando ne devas esti ekspedataj du gazetoj de la sama speco (E. S. el majo 1951). Ĝi estis gazeto eminenta kaj faris dum du jaroj de sia ekzisto tre bonan laboron. La redaktintoj kaj la eldoninto akceptu nian varman dankon.

Ĉantorio-monto. La tradicia ekskurso kunvenigis la 24-an de junio ĉ. 80 samideanojn, krom tiuj el Ostrava-regiono ĉeestis reprezentanto de nia Centra Komitato s-o Ant. Slanina el Praha, multaj esperantistoj el Moravio kaj el Slovakio, inter ili MUDr L. Izák el Martin. Krome ĉeestis gasto el Poznaň. Estis tre multaj gejunuloj inter la ĉeestantaro.

JUDr Josef Fousek 70-jara. Li naskiĝis la 9-an de aŭgusto en Hostim apud Beroun, esperantistigis en 1907 kaj restis daŭre aktiva en la movado. Kiam inter la du militoj kunvenadis laborkonferencoj de orientbohemiaj esperantistoj, kunvokataj de UEA-ĉefdelegito Oto Sklenčka, partoprenis ilin Dro Fousek regule kaj aktive. Ofte li persone prezentis esperantlingvajn kantojn per sia kulturita vira voĉo. Kantataj tekstoj estis ofte verkita aŭ tradukitaj de li, ĉar li estas funda konanto de muzika scienco kaj aktiva muzikanto kaj kantanto; li majstras aldoviolon. Ankaŭ aliaj versoj estas de li tradukitaj. Li meditis profunde pri teorio-versofara, pri natura ritmo de la lingvo kaj pri principoj de melodio. Ĉio ĉi igis lin tre utila kunlaboranto de Dro Pumpř en la eminentaj tradukoj de la tri operoj En la puto, Vendita Fianĉino, Najado. Profesie li estis advokato en Přelouč, kie li vivas daŭre, kontenta patro kaj avo. Lia vivo vidigas multajn virtojn. Por ni la plej valora estas persistemo. Pro ĝi li estu salutita precipe arde.

NI LEGIS

Fonda kongreso de Ĉina Esperanto-Ligo okazis la 11-an de marto 1951 en la ĉefurbo Pekino, je la 9-a matene en la halo de la Kultura Klubo de la Tutlanda Komitato de la Popola Politika Konsiliga Konferenco. Ĝia oficiala organo „Popola Mondo“ (P. O. Kesto 77, Peking) el aprilo dediĉas la tutan kajeron (48 paĝoj de teksto ĉina kaj esperanta kaj 4 paĝoj de bildoj) al raporto pri tiu ĉi okazintaĵo grava ne nur por esperantistoj en Ĉinio sed por la movado tutmonda. La raportoj estas en Esperanto kaj en la ĉina. Ĉeestis pli ol cent partoprenantoj, inter ili Hujucz, pioniro de la ĉina movado, Ĉ. Ĉen, sekretario de la prepara komitato, kaj reprezentantoj de esperantistaj organizaĵoj el diversaj lokoj de la lando. Kiel oficialaj reprezentantoj ĉeestis Jang Han-ŝeng, vic-ĉefsekretario de la Komitato de Kulturaj kaj Edukaj Aferoj de la Centra Popola Registaro, Hung Ŝen, estro de la Buroo por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando kaj Liu Zun-ĉi, estro de Informa Buroo. La ĵurnalo „Lumo“, organo de la Ĉinia Demokrata Ligo, dediĉis paĝon al la fonda kongreso, kun fruntartikolo „Per Esperanto por Mondpaco“.

En la malferma parolado k-do Hujucz kritikis la malgustajn opiniojn de la burĝaj lingvistoj kaj etburĝajn revojn pri Esperanto kaj akcentis la valoron de Esper-



JUDr Josef Fousek

anto en batalo por mondopaco kaj interkompreniĝo de la pacamaj popoloj. En la honora nomaro de martiroj de la ĉina revolucio dum la 30 jaroj troviĝas ne malmultaj nomoj de esperantistoj.

Jang Han-ŝeng diris, ke dum la kontraŭ-japana rezista milito Esperanto estis utiligata en internacia propagando kun sufiĉe granda efiko. Nun, ĉar la popoloj de la tuta mondo soifas kompreni la novan Ĉinion, estas granda bezono pliintensigi nian internacian propagandon kaj Esperanto povos multon fari en tiu ĉi rilato.

Liu Zun-ĉi diris, ke nur se ni havas firman starpunkton kaj uzas Esperanton kiel ilon en la batalo por la bono de la popolo en ĉiu historia etapo, ni ĝin uzas prave kaj ĝuste. Kvankam esperantistoj ĉinaj kaj eksterlandaj havas malsamajn opiniojn pri Esperanto kaj la reakciuloj faras malutilon al la popolo ankaŭ per Esperanto, tamen tio ne estas kulpo de Esperanto. La ĉefa problemo estas, en kies mano estas la ilo kaj al kia celo ĝi servas.

Al la kongreso venis 158 saluttelegramoj kaj salutleteroj. La numero represas 16 el ili en ĉina traduko, sur la unua loko tiun de nia Asocio. El la aliaj estas enpresitaj la sendintoj, el nia lando estis senditaj sume 28 salutoj.

Ni uzas tiun ĉi okazon por saluti la novan ligon ankaŭ sur paĝoj de nia organo kaj deziri al ĝia laborado la plej grandajn sukcesojn.

La Studento, Internacia Studenta Gazeto, komencis aperadi en aprilo 1951. Tre bela presita unua kajero estas 12 paĝa. La fruntartikolo promesas pritrakti studentajn kaj universitatajn aferojn, informi pri universitatoj kaj altlernejoj, kiel ili instruas, kiaj estas laboroj de la profesoroj kaj de la studentoj, pri sociala stato de studentoj, instruistoj kaj sciencistoj. La gazeton eldonas Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejoj kaj Studenta Esperanto-Klubo Kopenhago. Redaktas Johs. Vesterland-Andersen, Bernstoffsvej 78, Helleup, Danlando.

Profesoro Aimé Cotton, membro de la Scienca Akademio Franca, honora profesoro de la Scienca Fakultato de Parizo, tutmonde konata pro siaj esplorkontribuoj en fiziko, mortis la 14-an de aprilo 1951, 82-jara. Forpasis konvinkita esperantisto, prezidinto de Internacia Scienca Asocio Esperantista dum pluraj jaroj, aktive parto-

preninta la movadon. Lia unua komunikado pri la granda elektromagneto de Bellevue estis verkita en Esperanto. Tiaj homoj honorigas la tutan homaron. (Laŭ Franca Esperantisto, VI/VII 1951.)

„La morala raporto“, kompilita de S-ro Guillaume por kongreso de la Unuigo Esperantista de Francujo la 13-an de majo en Lyon, ne estis aprobita, dum la raportoj „financa“ kaj „propaganda“ aprobitaj estis. Ni ne komprenas bone la vorton „morala“. Ĝi estas nepre francismo nomi tiel raporton, en kiu temis versmile pri aferoj organizaĵaj ne pri moralaj. Mi konjektas tion el raporto en Franca Esperantisto (jun.—jul.), kie estas dirite sur p. 114, ke la raporto entenis nenion, kio povus naski disputon, ĝi nur aludis al aliaj raportoj kaj konstatis kun laŭdoj, ke kelkaj grupoj bonege agadis. En la franca lingvo amplekso de la vorto „morale“ estas multe pli granda ol en ĝia internacia aŭ interlingva uzo. Samideanoj francaj devus atenti tion.

Teksto de ĉs leĝo por protekti la pacon el la 20-a de dec. 1950 en traduko de A. V. Zednik aperis en Esperantista Laboristo (marto—aprilo 1951).

Sidejo de Sindikata Esperantista Asocio Tutmonda estis malpermesita en Francujo en marto 1951. Esperantista Laboristo sciigante tion en aprilo vokas: „Vivu la nova Internacia Ligo de Progresemaĵoj Esperantistoj!“ La estraro de SEAT proponis jam la 28-an de januaro, ke SEAT kunfandiĝu kun ILPE. Intertempe aperis, ke pro teknikaj cirkonstancoj provizore sidejo de ILPE ne povas esti Praha. Sed same evidentiĝas, ke ekzistas ne en unu lando esperantistoj progresemaĵaj, kiuj vidas kiel unu el la plej gravaj aŭ unikaj taskoj batali por la paco organizite laŭ la decidoj de la Pacokongresoj en Stokholmo kaj Varsovio.

Tria kongreso de Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEFF) en Parizo la 16—20-an de majo kunvenigis 400 fervojistajn esperantistojn el 11 landoj: Nederlando, Germanujo, Danujo, Norvegujo, Svedujo, Finnlando, Anglujo, Italujo, Aŭstrio, Svisujo, Francujo. La nombro de kongresanoj estas impona pro si mem, precipe se oni memoras, ke temas pri kongreso tre faka. S-ro Marcel Mollion, prezidanto de Unuigo Arta kaj Intelekta de la Francaj Fervojistoj, alportis al la kongresanoj saluton de 50 000 francaj fervojistoj grupigitaj en tiu ĉi organizajo. La inaŭguran kunsidon ĉeestis s-ro N. Barfelmes, kiu salutis la kongreson en nomo de SAT kaj D-ro Ivo Lapenna en nomo de UEA. La plej grava tasko de la kongreso estis diskutadoj pri eblecoj publikigi teknikan kaj profesion terminaron por fervojistoj. La lingva komisiono elektita lastan jaron en Salzburg konigis la staton de siaj laboroj. Nun ĝi zorgas pri traduko de nomenklature de la fervojaj veturiloj en iliaj partoj esencaj kaj akcesoraj. La fakeco, kiu estas videbla el raportoj pri tiu ĉi kongreso meritas apartan laŭdon. (Laŭ Franca Esperantisto, jun.—jul. 1951.) Se iu timas, ke nuntempe nia movado stagnas, tiaj kunvenoj kiel tiu ĉi konvinkas, ke la timo estas senkaŭza.

La Movado, organo de Kansai Ligo de Esperantaj Grupoj (Oimatu Buildings, Sinmeityo, Kita ku, Osaka, Japanio) estas nova bulteno de japanaj esperantistoj. En ĝia 2-a numero (16 paĝa) ni trovas poemeton dediĉitan al ĉeĥoslovakaj kamaradoj pro iliaj donacoj al la japanaj pachatalantoj. Mi citas kelkajn versojn de poemo verkita en arestejo:
Kun kol' kuntirata en travento
jen frotante frostŝvelintajn manojn,
ree mi baldaŭ kunparolas
Stalin pri „Problemoj Leninismaj“.
Blanka la teroro februara

de solula ĉelo povas
mordi miajn manojn kaj piedojn
sed min fari izolita vi ne povas.

Ĉu la mondo ridas egalmaniere? Ŝajnas, ke jes. Japano bulteno „La Movado“ en sia 2-a n-ro represas el La Praktiko paĝon de spritaĵoj kolektitaj el mondkonataj jurnaloj. Ili similas al si reciproke pro artefariteco, oni elŝvitis la spritaĵojn. Kaj japana gazeto ne volas nek povas aldoni almenaŭ unu spritaĵon el sia propra provizo.

Por pli bela estonteco titolas ciklostilita bulteno, de Esperantista Klubo de Tokio-Universitato (Meguro-ku Komaba 865). La unua numero aperis en decembro 1950. Ankaŭ ĝi estas batalanto por la paco. La artikoloj titolas: Internacia Solidareco, Pacdefenda movado en Japanio, Tiel ni batālis (pri batalo de studentoj kontraŭ persekutado de komunistaj kaj aliaj progresemaĵaj elementoj).

Popola Bildgazeto estas riĉe ilustrita ĉinlingva revuo grandformata, kajeroj po 36 paĝoj kaj kovrilo. Plejparte represajoj de fotoj, sed krome ankaŭ de bildoj; tiuj ĉi ofte kolore presitaj. Ni ricevis de la „Ĉina Esperanto-Ligo“ duan numeron el la unua volumo el aŭgusto 1950. Al ĝi estas aldonita ciklostilita traduko de ĉinaj tekstoj sub la bildoj. En tiu kajero estas sume 155 bildoj. La traduklingvaĵo estas eminenta. La traŝirigado de la bildoj kaj traŝirigo de la tekstoj donas tre intuan imagon pri la ĝoja vivo en la nova Ĉinio. Jen kelkaj el la subbildaj tekstoj: Generalo Kim Ir-Sen de Korea Demokrata Popola Respubliko. La Korea popolo festas la liberigon de Seoulo. Amaskunveno kontraŭ la agreso de usonaj imperiistoj al Tajvan kaj Koreio en Ĉina Popola Universitato. Gelernantoj de popollernejo en Ŝanhajo subskribas siajn nomojn sur la porpacan alvokon. Impona aspekto de la parado. Sub la prezido de Prezidanto Maŭ estas akceptita la leĝo de agrara reformo. De tritiko al faruno. Huang Ŝi-ĵen renkontas blankharulinon en tempesto ktp. Sur ĉiuj bildoj, vidigantaj laborprocedon, ridantaj vizaĝoj. Estas tre edifante foliumi tian kajeron. Diferenco inter vivmanieroj kaj vivstiloj en Azio kaj Eŭropo ŝajnas forviŝita. Al la kajero estas aldonitaj tri grandaj portretoj por ornamo la ejojn aŭ por procesioj: Maŭ Ze-tung, Coŭ En-Laj, Liu Saŭ-ĉi.

H. Sirk: El la historio de nia lingvo. Prof. ĉe Vienna universitato H. Sirk faris ĉe la Aŭstria kongreso en Linz la 13-an de Aŭgusto 1948 paroladon. Ĝin aperigis la „La Distro“ (Zeitvertrieb) eldonata de la Aŭstria E-Junularo (Wien I Neutorg. 9.) dediĉinte al ĝi sian numeron de marto-aprilo 1951, sume 10 paĝojn. Prof. Sirk emfazis en sia parolado precipe Zamenhofan paroladon en la Dresdena Kongreso en 1908 kaj lian sintenon al la Ido-krizo, kiu en tiu jaro ŝajnis jam esti venkita. Ĉefa instruo, kiun ni devas ĉerpi el tiamaj spertoj, estas apogi nin sur propraj fortoj kaj ne fidi, ke flanke starantaj personoj, eĉ se ili estas aŭtoritataj, povas iel helpi nian agadon.

Pastro J. B. Se-Tsien Kao, O. F. M., eminenta ĉina pastro, verkisto kaj Esperantisto-pioniro, kiu multon helpis al Esperanto en Norda, Centra kaj Suda Ameriko kiel ankaŭ en Eŭropo, venis el Hongkong trans Usono kaj Brazilo en la ĉefurbon de Peruo Lima, kie li ricevis taskon prizorgi religiajn bezonojn de tieaj katolikaj ĉinoj. — (Laŭ Amerika Esperantisto, jan.-febr. 1951.)

15 000 dolarojn por instrui Esperanton ricevis religia kolegio en Elizabethtown, Pennsylvania. Testamento de Emma C. Lander donas tiun sumon kun la kondiĉo, ke la rento — aŭ rento aŭ kapitalo — estu uzata por ebligi kursojn de Esperanto en la kolegio. D-ro Frederick C.

Neumann, membro de la lingva fako, komencos instrui la kurson laŭ nunaj planoj aŭtune 1951. — (Amerika Esperantisto, jan.-febr. 1951.)

Aktivecon de esperantistoj en Pollando provas, ke krom „Tra la mondo kaj literaturo“ aperanta ciklostilite en Warszawa komencis aperadi nova bulteno de Vroclava sekcio de Asocio de Esperantistoj en Pollando „Odrasilezio“. Ĝi titolas Vroclavano, estas bele ciklostilita, la kajeroj havas po 16 aŭ pli paĝoj. Kun kontento ni konstatas, ke ankaŭ tiu nova nia kolego dediĉas multan atenton al batalo por la paco. Adreso: Wrocław, ul. Swierczewskiego 104.

La kongreso de polaj esperantistoj, okazonta la 15-an de majo, estis prokrastita.

Zamenhof-monumento en Brazilo estis inaŭgurita per solena ceremonio la 17-an de decembro 1950 en Belo Horizonte, ĉefurbo de la ŝtato Minas Geraes. Ĝi estas bronza busto skulptita de karmemora brazila profesoro Samuel Martins Ribeiro. La granda skulptaĵo staras sur alta piedestalo el blanka marmoro starigita sur bedo en formo de kvinpinta stelo en publika ĝardeno ĉe la kruĉigo de av. Tocantis kaj str. David Campista. La inaŭgura ceremonio estis la lasta programero de la 12-a Brazila E-Kongreso, kaj estis tre solena. Ĉeestis Supera Juĝisto D-ro Arnoldo Alencar Araripe, Supera juĝisto D-ro Mario Matos, Juĝisto D-ro Carlos Resende, D-ro Mário Ritter Nunes por Instituto de Geografio kaj Statistiko, fr-ino Lígia Agrícola Nogueira kaj eksministro Octacilio Negrao de Lima, urbestro, kiu reliefigis la altan valoron de Esperanto por pacigi la spiriton de popoloj. Tiu monumento estas ĝis nun la unua en Ameriko kaj la plej malproksima de Zamenhofnaskiĝloko. Ĉeestis la ceremonion la reprezentantoj de la pola kolonio loĝanta en Belo Horizonte kaj ornamis la piedestalon per bela girlando el naturaj floroj. — (Laŭ Brazila Esperantisto el jan.-feb. 1951.)

Salzburg, Aŭstria, Oestereich Austria, estas titolo de tre bela ilustrita prospekto, 10 paĝa kun du aldonitaj broŝuretoj „Eta gvidilo tra urbo kaj lando Salzburg“ kaj „Listo de hoteloj kaj pensionoj“. La tekstoj estas en la germana, angla, franca, itala, hispana, portugala kaj Esperanto. Riceveblaj de Landesverkehrsamt en Salzburg, Sigmund-Hoffner-Gasse 3/11.

Malgranda Revuo redaktata kaj eldonata de Stellan Engholm (Hagge, Svedujo), dumonate en belaj kajeroj po 32 paĝoj, finis en 1950 sian okan jarkolekton. Ĝi kolektis sur siaj paĝoj rimarkindajn verkaĵojn precipe el sociaj sciencoj sed ankaŭ pri politiko, lingvo kaj literaturo. Estas tre bedaŭrinda la sciigo, ke ĝi pro nesufiĉa nombro de abonantoj ĉesos verŝajne aperadi.

Interna Bulteno de Esperantista Ligo Israellanda nro VI/1 el aprilo 1951 diras en artikolo „Survoje al cel' unu fojon signita“ pri disvolviĝo de nia lingvo en Israellando: Ne estas strangajo, ke ĝuste la dua mondmilito kaŭzis la formadon de nia tutlanda ligo. Dum la unuaj militjaroj la lando pleniĝis de soldatoj el plej diversaj armeoj. Aperis multaj samideanoj en plej diversaj uniformaj vestoj. Kun veraj ŝatecintoj ni memoriĝas pri la tre simpatiaj figuroj de G. C. McNabb (Aŭstralio), Ross Gordon Robbins (New Zealand), Ken Young, kap. M. H. Robinson (Anglujo), la nobla majoro Roman Fiedorowicz (Polujo) kaj brava ĉeĥa kapitano kun malfacile memorebla familinomo.

Niaj aviadiloj faligis tridekkvinmil. litrojn da napalmo (jелеigita petrolo), per kio la regiono celata fariĝis bolanta maro el kraĝegantaj flamoj. — Raporto de U. N. en Koreujo. — Kia vere krista agado fare de civilizitaj nacioj kristanaj! — (Eta Heroldeto, Wiltoughby, N. S. W., Aŭstralio, majo 1951.) — (O. G.)

„La vagabonda avino“ vizitas Norvegujon. Ĉu vi konas la „vagabondan avinon“? Se vi loĝas en Fran-

cujo, Nederlando, Belgujo aŭ Danlando, certe jes. Temas pri nia samideanino Patricia De Cleene el Nov-Zelando. Nun ni ankaŭ en Norvegujo konas nian bonhumoran, simpatian, vojaĝeman samideaninon. Kiel kaj kial vi ekhavis tiun interesan nomon kaj ĉu vi efektive estas avino? ni demandis al la junaspekta esperantistino. Jes, avino mi estas kaj la nomon oni donis al mi en Francujo — pro mia vagabonda vivo dum la lasta duonjaro. Mi forlasis mian hejmlandon, Nov-Zelandon, jam en septembro pasintjara. Sed antaŭ ol iri Eŭropon, mi restis 7 monatojn en Aŭstralio. De tie mi iris per itala ŝarĝŝipo al Italujo. Same estis en Egiptujo, kien ni iris poste. La ŝipo estis ŝarĝita per greno kaj du semajnojn ni devis atendi, antaŭ ol finfine la ŝipo estis malplendigita. Tio plaĉis al mi — ĉar per tio ekestis okazo viziti la piramidojn kaj aliajn vidindaĵojn. Ankaŭ en Aden kaj Colombo mi estis. Estante en ŝipo mi konstatis, kiom necesa estas Esperanto en la interpopola interrilatado. Entute 14 lingvojn oni parolis kaj regis vera lingva ĥaoso. Iu viro scipovis 5 lingvojn, sed tamen li povis kun neniu el la aliaj paroli. Anglujo estis mia sekvanta restadejo. Vokis Francujo. Kaj en Francujo vi komencis vojaĝi „aŭtostope“? Jes, multege da homoj aplikis tiun vojaĝmanieron — kaj kial do ne ankaŭ mi faru? Mi komencis kaj poste mi vojaĝis tra pluraj landoj per levo de la dikfingro. Jen do, kiel mi fariĝis la vagabonda avino. Nu, kompreneble ne ĉiam estis same agrable — kaj unu nokton mi trovis neniun alian elirvojon ol kuŝiĝi en la dormosako sur kampo en Belgujo. Estante en Nederlando mi aŭdis pri somera kurso, okazonta en Velje, Danlando. Mi decidis partopreni. La kofron mi surdorsigis kaj ekstaris ĉe la vojo atendante, ke iu afabla aŭtomobilulo helpu, por min inviti al kunveturo. De tie mi venis tra Malmö al Norvegujo. Estas plano, ke mi faru paroladojn pri Nov-Zelando. — (Mallongigite el Norvega Esperantisto, Oslo, nro 1/1951.) — (O. G.)

Finna gastamo. La finnlingva esprimo por „fremdulo“ kaj „gasto“ estas la sama kaj la finna popolo agas en tiu senco. — (Marie C. Major en The Worker Esperantist, London, nro 68/1951.)

Kvitanca marko pri pagita kotizo 1951 estis enpresita en la pasinta numero sur la lasta paĝo. Tiun kajeron ricevis sole tiuj, kiuj jam pagis la kotizon. Bonvolu ĝin glui en vian membrokarton. Nepagintoj pagu la kotizon tuj, proksimiĝas ja fino de la jaro. Niaj membroj bonvolu agiti por regula pagado de la kotizo. Precipe klopodu lokaj grupoj, kiuj ĝis nun ne pagis, ke ili baldaŭ atingu ordon en financa flanko de sia agado!

LINGVO

32. text k překladu:

Předkládáme tentokrátě úryvek z povídky „Od nového roku do postu“ od Josefa Kajetána Tyla z roku 1846. Prosíme o hojnou účast překladatelů. Svě práce raĉte poslati do 14 dnů po obdržení čísla.

Já nejsem z oněch rozpadlých nevěřilců, ježto myslí, že je celá minulost už vymačkaná, a přítomnost že je planá, prázdna, jalová. Já pravím: Život je věčně mladý, plný síly a bujarosti, a kde do něho sáhneš, máš kus masa a krve — a byt' by i bylo to nebo ono nahnilé, můžeš mít z toho pořád novou a novou báseň, román i novelu. Předmětů neschází, — ale očí schází, kteréž by se na ně dívati dovedly — totiž tak dívati, aby na nich něco shledaly, co jiní ještě neviděli. To je vlastně to veliké tajemství původnosti a ne pouhé vymejšlení a řadování neobyčejných událostí. Pravý básník najde všude hojnost předmětů. On je jako ten mladý havíř a miláček horního ducha v národní báchorce, kterýž kamkoli pohlédne, všude ukryté kovy nalezne. Celou

přirodou jde jedna velká báseň a rozpadá se v tisíce menších básniček, v nichžto dílem smích a dílem pláč s celým svým průvodem rozmanitých vášní se rozléhá. I chtěl bych se o nevim co založiti, že ku příkladu dnes večír — třeba zde v této přátelské besedě, mnohý původní román se zaplítá, kterýž, kdyby takovým rukoum, jako má Hugo nebo Sue, do rukou padl, více hluku by nadělal, nežli kdyby vyšel z našich domácích.

LOKAJ INFORMOJ

Bratislava. — Junaj esperantistoj laboras en kadro de SES, ankoraŭ ne kiel organizita junularo. Ili kunvenas ĉiam antaŭ regula kunveno kluba kaj perfektigas en la lingvo.

Brno. — Laboras ok-membra junularo fondita laŭ iniciato el Ostrava. Kunvenas 2—3 foje semajne. Por la E. K. ĝi jam preparis multajn programojn.

Duchcov. — Rondeto de esperantista junularo estis fondita jam en 1948 kiel interesrondeto de la 2-a mezlernejo. En septembro 1950 havis la grupo 16 membrojn, kiuj kunvenadis dusemajne.

Gottwaldov-Otrokovice. — Esperantista vivo estas ĉi tie tre vigla. Rondeto de esperantistoj, fondita kiel parto de Závodní klub ROH n. p. Svit, kunvenadas regule unufoje en semajno (merkrede je la 20. horo) en aparta klubejo de Závodní klub (pli frue Společenský dům). Závodní klub ROH n. p. Svit subtenas la rondeton de esperantistoj morale kaj ankaŭ finance. Tiel ekzemple ĝi ebligis al multaj samideanoj partoprenon en tutŝtata kongreso de EAĈSR en Brno, al kelkaj samideanoj viziton de someraj kursoj de Esperanto en Svit pod Tatrami kaj Doksy, ĝi aĉetis por nia biblioteko kelkajn esp.-vortarojn kaj alian esperantan literaturaron ktp. — La 30-an de junio aranĝis rondeto de esperantistoj ĉeĥo-esperantan vespereton. Je la programo estis prelego de samideano Pittner pri signifo de Esperanto, deklamoj, kantoj, unuaktaĵo „En kongreso“, rememoroj de malnovaj esperantistoj — veran entuziasmon vekis la vortoj de s-ano Fr. Blaha — kaj mallongaj raportoj pri esperantista movado en kelkaj lokoj de regiono de Gottwaldov. Krom la lokaj esperantistoj partoprenis la vespereton ankaŭ samideanoj el Gottwaldov-Zlín, Kroměříž, Kojetín, Bojkovice kaj Lanžhot. — (Omelka.)

Háj u Opavy. — Junularo 20-membra kunvenas ĉiusemabate. Organizis du kursojn kaj laboris precipe en la kultura sfero. Partoprenis en komunaj entreprenoj kun Opava kaj Ostrava. Nun la grupo estas eniĝinta en ROH-BRANO.

Hradec u Opavy. — Junularo komencis labori en novembro 1950 kun 8 membroj. Nun ili estas 18. Eniĝis en ROH, kiu disponigis al ili klubejon. Hradec u Opavy estas turiste grava loko, la grupo intencas tion uzi por propagando de E.

Hradec Králové. — En organo de fervojista oficejo distrikta „Hradecký železničář“ en n-ro el 20. VII. ni legas ĉeĥan raporteton verkitan de la redaktoro pri la solena kunveno de la Esperanta sekcio de la Kultura Klubo ROH por honorigi sesdekan naskiĝtagon de s-o Pytloun. La ne-esperantista ĉeestinto diras: „Dankon al ĉiuj, kiuj helpis aranĝi tiun belan vesperon, kaj estas nia deziro, ke ankaŭ aliaj sekcioj de nia ROH-klubo stacio Hradec Králové efektiviĝu tian agadon, kiel nia Esperanto-sekcio.“ — — — Provizore estas esperantistoj nia modelo. Tial ek al la laboro!“

Jablonec n. N. — En la 1-a mezlernejo laboras rondeto en kiun venas junaj samideanoj el la Klubo. Plua rondeto laboras en Pěčín apud Jablonec. La tuta grupo estas tre aktiva, en klasejoj muntas murgazetojn kaj interŝanĝas kun infanoj el aliaj landoj infanajn desegnaĵojn kaj alian materialon, kiun ĝi uzas por diversaj ekspozicioj.

Lanškroun. — Aktiva junulara grupo eldonanta bultenon „Esperanta Vorto“. Kurso ĉiumerkrede, sed la junaj esperantistoj kunvenas ankaŭ en aliaj tagoj. La grupo aranĝis akiran amikan kuneston kun diapozitivojn por ne-esperant publiko.

Olomouc. — E. S. aranĝis la 21-22-an de julio ekskurson por viziti la Trian Someran E-Kursaron en Rožnov p. R.

Olomouc. — Junularo esperantista konstituiĝis la 17-an de majo. Instigon por tio ili ricevis pro vizito de junularo el Ostrava (Laŭ Bulteno eldonata nun de Kleriga kunularo ĉe JNV en Opava, interesrondeto Esperanto). La grupo havas 10 membrojn kaj kunvenas ĉiujnaŭde, partoprenis en Ĉantoria-ekskurso.

Opava. — Junularo komencis labori dum printempo 1950. Eldonis plurkoloran afiŝeton en 5000 ekz., aranĝis plurajn kursojn, el mono gajnita per brigadoj projekciis en kinejoj 6 diapozitivojn, eldonas ciklostilitan bultenon kunigantan ĉiujn grupojn en Moravio. La cirkulero de la Opava-junularo eldonata nun de la Kleriga Kunularo (Osvětová beseda) ĉe Unueca Nacia Komitato aperigis en julio jam sian 12-an numeron, post unujara aperado.

Ostrava. — Junularo akiris ĝis aprilo 46 novajn membrojn por la Asocio. La 8-an de marto la junularo salutis en sia klubejo junularan membrinon Martan el Praha kaj samideanon el Liberec, kiuj ambaŭ partoprenis en Junulara laborbrigado en Vratimov. Ambaŭ vizitadis ilin dum sia tuta brigado. (Laŭ Bulteno Junulara el Ostrava, n-ro el aprilo). La 4-an de majo vizitis tri membroj de la junularo bicikliston esperantiston s-on Dieudegard partoprenantan en konkursa biciklado Praha-Warszawa en ODK-hejmo, kie la konkursantoj loĝis. Li estis tre ĝojigita pro la vizito samideana. Dimanĉon venis granda nombro de esp. junularo por adiaĵi la biciklistan plotonon antaŭ la starto sur stadio kaj donacis al la esperantista sportisto Esperanto-kravatton. — La junularo aranĝis tri tre sukcesajn kursojn. Sur multaj lokoj instalas transporteban E-ekspozicion, kreis konstantan kolektivon, kiu per komunaj ekskursoj, aktiva partopreno en kulturaj aranĝoj k. s. firmigas siajn persistemon kaj entuziasmon en la laboro.

Plzeň. — En unu el propagandaj kestetoj de nia grupo altiris atenton de juna verkistino letero de japanaj infanoj komencanta „Redonu al ni nian panjon“. Ŝi skribis la 25-an de junio al k-do R. Burda petante pri pluaj informoj; ŝi volas uzi ilin por verki rakonton pri tiuj okazintaĵoj konsternantaj pro krueleco de kapitalistoj kaj edifantaj pro fido al justeco age de simplaj homoj malriĉaj. — Junaj laborantinoj de Škoda-uzinoj sendis la 24. V. 1951 salutleteron al gvidantino de japanaj virinoj k-dino Yukiko Yumada en Kosto-fu (Japanujo), en kiu ili priskribas nunan vivon de virinoj en nia lando. — Niaj membroj en Plzeň gvidataj de s-o R. Burda organizas sendon de protestoj kontraŭ klasa justico estranta tribunalojn en kapitalistaj landoj. Protestoj kontraŭ maljustaj verdiktoj en Macukaŭa afero estis senditaj de Entreprenaj Konsilantaroj ĉe Naciaj Komitatoj en Plzeň, de Komunista Partio en la sama ofico, de personaro de teatroj en Plzeň, de personaro de Radio en Plzeň kaj de ĝia Junularo al ministerio de justeco en Tokio. — En Uzina Kultura Klubo Škoda estis dum jun.-jul. aranĝita, laŭ iniciato de k-do Rud. Burda, ekspozicio de materialo pri pacobatalo akirita per Esperanto precipe el Japanujo, Ĉinio kaj aliaj landoj. La ekspozicio havis tre atentindan resonon.

Plzeň. — Junulara grupo estis fondita en decembro 1950 kun 11 membroj. El ili 5 vizitas kursaron en Rožnov.

Poprad. — Junulara grupo intense kunlaboras kun tiu en Svit.

Třebíč. — Jarkunveno en junio decidis, ke la grupo eniĝu kiel sekcio en Klerigan Kunularon.

RICEVITAJ LIBROJ

Maurits Dekker: La mondo ne havas atendejon. Tetraĵo en tri aktoj. El nederlanda lingvo tradukis F. Faulhaber. Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, Paris XII. 80 paĝoj 13,5×21 cm. Prezo 0,70 dol. — La aforismo titola volas diri, ke ne estas eble intence resti ekster la batalo furiozanta inter la homaro pro diversaj konceptoj pri ĝia vojo al estonto. La sciencisto esploranta transmutacion de elementoj ne rajtas esti indiferenta, ĉu oni dungis lin por fabriki atombombon aŭ por apliki la atomforton al pacaj celoj. En tiu ĉi dramo la filo de sukcesa inventisto, kunlaboranta kun la patro kun ĝenerale agnoskata sukceso, decidis ekŝiĝi el fabrikado de mortinstrumentoj, ĉar li timas la konsekvencojn. Sed en la momento, kiam ne-atendita reakcio de novspeca radiumo minacas detruil la tutan urbon kun dekmiloj da loĝantoj, haltigas li la reakcion, kvankam li klare scias, ke atako de gamma-radioj estos por li mortiga. En tiu korp-kaj animstato li ankoraŭ pli klare vidas krimecon de kunlaborado ĉe bombofabrikado kaj sukcesas konvinki pri tio ankaŭ sian patron, kiu disŝiras la raporton pri siaj rezultoj kaj riskas esti arestita de generaloj, kiuj estras la esploradon de radiumaj elementoj. Tiu ĉi dramo havis en j. 1949 grandan sukceson en Nederlando, atingis dum 11 monatoj pli ol cent prezentigojn, kaj ankaŭ en Danlando, Svedlando kaj Israelo rikoltis grandajn sukcesojn. La tuta dramo estas alarmiga voko kontraŭ eksperimentoj fabriki ĉiam pli bonajn atombombojn por detruadi pli sukcese la „malamikajn“ teritoriojn. Ĝi estas unu el batalkrioj por la paco, kiuj aŭdiĝas en kapitalistaj landoj. En landoj, kie la paco estas programo registara anstataŭ tiaj voĉoj ekzistas planata organizado de la pacolaborado, kiu konsistas en pligrandigado de la laborproduktiveco, kies rezultoj estas juste distribuataj al tiuj, kiuj meritas tion pro sia partopreno en krea laboro.

La traduko estas farita tre zorge. Sed iam zorgo pri aŭtentikeco de la teksto kaŭzis, ke la frazoj ne estas tro bone paroleblaj, ili ŝajnas iom tro altstilaj. Ekz. sur la 17-a paĝo interparolo de patro kaj filo: Eĉ se ni koncedas, ke la patro parolu patose, la filo ja volis paroli per parolturnoj banalaj; sed tio tute ne estas videbla el liaj frazoj, ili estas tro frizitaj. Viva homo verŝimile dirus erarojn en tia situacio. Oni ne devus timi verki tiajn erarojn por la aktorontoj. En la frazoj „mi agas kvazaŭ nia komedio havas utilon“ aŭ ni agas „kvazaŭ ni estas instrua objekto“ estas, laŭ mia lingvosento, la indikativo eraro. La us-modo en Esperanto havas funkcion kaj de kondicionalo kaj de konjunktivo. En tiaj frazoj, kiaj la cititaj, temas ja ne pri aserto, ke io okazas, sed pri konstato, ke okazus intence alimaniere ol ĝi estas vidata. Nia komedio ja ne havas utilon, nek ni estas instrua objekto. Tial tiuj konjunktivoj. — La apero de tiu ĉi teatraĵo estas grava faro. La tradukinto kaj la eldonintoj akceptu nian gratulon kaj la aŭtoro estu salutita pro sia konvinko, ke nepre estas necese batali por la paco kaj kontraŭ militpreparantoj.

Sveda novelaro. Tradukis Ferenc Szilagy. 236 p. 12×19. Bindita 6 sv. kr. (Ĉe Sveda Laborista Esperanto Asocio, Barnhusgata 8, n. b. ö. g. Stokholmo.) — En la samtempa sveda literaturo floras novelo. Tiu ĉi libro prezentas 20 novelojn aŭ rakontojn de 16 nuntempaj svedaj verkistoj, tre diferencaj unu de la aliaj sed kun unu komuna trajto: ili ĉiuj estas aŭtodidaktaj, devenas el laborista klaso kaj apartenas inter la signifaj verkistoj svedaj. Multaj el ili estas 50—40-jaraj, malplimultaj estas ĉirkaŭ sesdek-jaraj. Leginto ricevas do el tiu antologio bildon pri samtempa sveda prozo. Multe helpas al tio skizoj pri vivo, verko, literatura signifo aŭ klasigo de ĉiu prezentita aŭtoro. La noveloj mem havas diversajn temojn, tre ofte temas

pri travivaĵoj de arbarlaboristoj aŭ de terkulturistoj. Ŝajnas, ke tiuj aŭtoroj preferas temojn el kamparoj kaj arbaroj ol el urbejoj. Al mi ŝajnas strange, konsciigante la devenon de tiuj verkistoj el laborista klaso, ke ilia sinteno al mizero de malriĉuloj estas ofte sentimentala, ne batalema; ili bedaŭras la subprematon, ili larmigas la leganton, sed ili ne trumpetas al atako kontraŭ ekspluatantoj. Ĉiuj prezentitaj rakontoj meritis tradukon kaj meritas atentan legadon. Ofte oni renkontas rimarkindan psikologion, emociigan penetron en profundon de la homa animo. Kiel ekzemplon menci la rakonton „Portu la ŝarĝon unu por la alia“ de Folke Fridell. La sperto, ke homo estas principe bona, estas tie demonstrita, ne sen komikaj ingrediencoj, sur primitiva situacio de simplaj homoj ekstreme konvinke: jes, laborkunulo meritis decan enterigon, eĉ se ĝi kostis penon kaj monperdon al la vivantoj. — La kompilinto kaj tradukinto estu laŭdita pro la ideo de la antologio, pro la elekto, kaj pro la literaturaj skizoj.

Cezaro Rosseti: KREDU MIN, SINJORINO! Heroldo de Esperanto. 260 paĝoj 14×19 cm. Bindita. — Originala verko, en kiu la aŭtoro rakontas travivaĵojn de „bazarulo“, vendisto vendanta komercajn artikolojn en foiroj klarigante aplikeblecojn de nove enkondukataj aparatoj. La rakontado estas tre agrabla por legi. La aŭtoro rakontas en unua persono kvazaŭ li mem estus travivinta tiujn ĉi interesajn, ofte komikajn, okazintaĵojn. Aperas sur scenejoj de diversaj foiroj tre malsimilaj personoj, viroj, virinoj de tre malsamaj karakteroj, la bazaruloj ŝajnas ĉiuj esti iel stranguloj kaj kuriozuloj, sed plej parte tre bonkoraj. Kaj kvankam ili ĉiuj tre fervore kaj sukcese laboras, mono ŝajnas daŭre eviti ilin. La aŭtoro estas eminenta rakontanto. Li estras la lingvon kaj pentras la situaciojn kaj sintenojn de rolantoj per trafaj vortoj, kiuj bildigas la scenojn tre konkrete kaj kun bonhumoro. Ofte enestas dialogoj tre vivaj; jes, tiel la personoj parolus efektive, se ili sciis Esperanton tiom bone kiel la verkinto. Li imitas slangojn diversajn, strangajn dirmanierojn kuriozajn, iam konversacion familieran. Li bezonas ie por tio neologismon, sed ĉiam tre trafe elektitan inter vortoj jam uzitaj. Ofte li prezentas ironiaĵojn, ĉiam tre trafaj kaj tuj kompreneblaj. Plurfoje rolas esperantistoj, unuopuloj aŭ kunvenoj, iam kun edifanta influo, iam prave mokataj. Efektive ĉarma legaĵo. Kiel tuto kaj en detaloj same. La verkinto de tiu ĉi libro, kiu ne estos baldaŭ forgesita, estas frato de esperantista poeto Reto Rosseti.

Li estis granda promeso por nia literaturo. Sed ho ve, li estis. Li finis tiun ĉi sian unuan romanon la 10-an de decembro 1949. Je la 6-a de majo 1950 li subite kolapsis en sia hejmo kaj du tagojn poste li mortis havante aĝon de 48 jaroj. Sole per silento ni povas funebri.

Tiu ĉi romano konservis tre intuan bildon pri la socio en industria lando inter la du militoj. Leginte ĝin ni sentas la profundan transformigon de la socio, kiu okazis en nia lando. Nerevenebla estas epoko, en kiu tiaj bonkoraj bazaruloj sin movis, ridis, ruzis, kaj vivis per tio, ke ili altrudadis al la publiko varojn ofte nebezonatajn. Ili laboris streĉe, dediĉis talenton kaj klopodojn por perlabori al si vivon ne komfortan. Iliaj ironioj kaj blasfemoj kaŝis antaŭ ili mem vanecon de ilia labortasko, observon, ke ili vivas parazite kaj servas al parazitoj. En nia planekonomio oni produktas nur tiujn varojn, kies bezoneco estis pruvita per sciencaj metodoj kaj en tia kvanto, kia estas bezona. Tial estas senbezonaĵaj ajn ruzaĵoj por vendi. Kaj la talentoj kaj laborpovo de iamaj bazaruloj estas uzataj por fabriki varojn posedindajn de ĉiu, kiu bezonas ilin. La tavolo de bazaruloj malaperis en socialista socio por ĉiam. Se oni finlegis libron de Rosseti, oni palpas la kontraston inter tio, kio estis, kaj tio kio naskiĝas.

Librovendejo de EAĈSR ofertas

Helpiloj por studo:

	Kĉs
J. V. Dolinský: Velká slovenská učebnica medzin. reči Esperanto (2,50)	65,—
Lad. Krajc: Učebné texty pro kursy (2,50)	20,—
V. Pechoč: Praktika konversacio (1,50)	15,—
A. Reček: Učebné texty (2,50)	30,—
J. Šupichová: Hovoříme esperantsky (2,50)	28,—
H. K. Bouška: Esperanto — jednotné jazykové pojítka národů. Krátké uvedení do esperanta. 10 ekz.	8,—
Dr. St. Kamarýt: Ellerni 1—12	10,—
E. E. Collinson: Esperanto a jeho kritikové ..	2,—
Dr. St. Kamarýt-Dr. T. Pumpr: O zkouškách z esperanta	10,—
Esperanto-Schlüssel	1,—

Vortaroj:

J. V. Dolinský: Malý slovník esper.-slovenský a slovensko-esperantský (2,50)	60,—
J. a K. Filipové: Velký slovník česko-esperantský (11,—)	390,—
R. Hromada: Slovník česko-esperantský (2,50) ..	40,—

Diversaĵoj:

M. Majerová: Urbo sub signo de fajro (2,50) ..	30,—
Dr. S. Schulhof: Bohemaj grenatoj (1,50)	15,—
J. a K. Filipové: Kantareto (2,50)	45,—
Teksto de kantoj, prezentitaj dum Esperanto-kongreso en Brno (por klubaj vesperoj)	6,—
Staňura: Propono de E-stenografio	3,—
Multobligitaj tekstoj de operoj, disaŭditaj de Verda Stacio en Praha:	
Najado (1,50)	20,—
Vendita fianĉino (1,50) Denove havebla!	10,—

Propaganda materialo:

Aliĝilo al Esperanto-kurso 100 ekz. (4,—)	35,—
Atesto pri kursfina ekzameno	4,—
Propaganda afiŝeto multkolora 1,50 aŭ	3,—
Kartona afiŝeto (1,50)	5,—
Propaganda afiŝo 41×30 cm — kun libera spaco por anonco de kurso ktp.	2,—
Stacidoma tabulo lada ESPERANTO-INFORMO, uzebla ankaŭ por klubejo (6,—)	100,—
La sama, iomete difektita (6,—)	50,—
Geografia karto de ĈSR sur duobla poŝtkarto — kun teksto pri naturbelajoj de ĈSR — 10 ekz. (1,50)	20,—
La sama geografia karto kun kantotekstoj — 10 ekz. (1,50)	20,—

Skribmaterialo kun Esperanto-emblemo:

Leterpapero kun koverto — 10 ekz. (1,50)	10,—
Aerpoŝta leterpapero kun koverto — 10 ekz.	15,—
Luksa karteto kun koverto — 10 ekz. (1,50) ..	15,—
Poŝtkarto — 10 ekz.	5,—
Poŝtkarto kun portreto de Zamenhof (Bartošik) ..	1,—
Novjara poŝtkarto de Bartošik	1,—
Glumarko: Esperanto — reĉo zitrka — 10 ekz. ..	3,50
Emajlita ŝildeto ESPERANTO PAROLATA 14×5 cm (4,—)	30,—

Insignoj:

Verda stelo sur blanka fono (afrank)	12,—
Verda stelo sur ĉs. flago (Bartošik) (afrank) ..	25,—

Senpage al eksterlando:

Konstitucio de Ĉeĥoslovaka respubliko
Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio

Al la prezo aldonu afrankon, notitan inter krampoj. Kiam ne estas notite, tiam minimume 80 helerojn. Plej simpla mendo per poŝta pagilo nro Ĉ 12371 Svaz esperantistů ĈSR, Praha.

Esperantista Junularo en nia lando starigis ĉie, kie ekzistas junulara grupo, delegiton. Anoj de la Junulara Asocio studu sekvantan liston kaj klopodu kontakti kun delegito de via aŭ najbara loko:

Brno: Drahomíra Chlubnová, 18, Charlubova 90.

Háj u Opavy: Miroslav Dumbrovský, ĉ. 88.

Hradec u Opavy: Miroslav Parusa, ĉ. 64.

Lanškroun: Jan Werner, Gottwaldova 65.

Litvínov: Jiří Pastor, I, Školní 646.

Most: Olga Závorková, Koněvova 71/11.

Opava: Vlastimil Novobilský, Tyršova 35.

Ostrava: Věra Sukačová, Třebovice ve Sl. 258.

Pižň: Ludmila Šloufová, Úslavská 55.

Svit-Tatry: Štefan Horák, Pension III/316.

Poprad: Milan Zvara, Masarykovo nábr. 62.

Praha: Josef Forman, XII, pošt. schr. 46.

Kladno: Věra Máťová, Resslerova 5.

Olomouc: Karel Fabián, Komenského 22.

Gottwaldov: Vlast. Bendová, Zlín II/10, stud. ústav.

Velké Svatoňovice: Karel Kopecký, ĉ. 296.

Chrastava: Ladislav Mlejnek, 226.

Bratislava: Magda Seppová, Křížkova 8.

Duchcov: Jaroslav Zíka, Jungmannova 1.

Jablonec n. N.: Miloslav Jíra, Jungmannova 7.

KORESPONDI DEZIRAS:

S-o Hans Mabesoone, 20-jara studento, Pythagorasstraat 122, Amsterdam Q, Nederlando.

Multaj japanaj junuloj kaj junulinoj. Skribu al: Isurugi Esperanto grupo, Fukumaĉi poŝtofiĉejo, Isurugi, Tojamaken, Japanujo.

S-o Franco Denkowski, str. Polna 3, Janów k. Katowice, Pollando, nur kun tiuj, kiuj konas kondiĉojn de vivo en minejoj aŭ laboras en ili.

S-o Josef Kožíšek, Na hliništi 52, Jihlava, Ĉeĥoslovakio, intŝ. pm. il. pk., gazetojn.

Fr-ino Nina Kanenova, 19-jara studentino, str. Rakovska 2, Russe, Bulgario, kun ĉs. samideanoj, intŝ. jubileajn pm., il. pk., il. gazetojn.

S-o Josef Ballay, str. Stará 14, Brno, Ĉeĥoslovakio, kun eksterlandanoj, nur bildkarte.

S-ino Maria Heeger, Overratherstr. 77, (22 C) Bensberg-Köln (Brita Zono) Germanio.

S-o Kuczera Witalis, agronomia teknikisto, 20-jara, en Mierzęcice 144, pow. Zawiercie, woj. Katowice, Pollando, pri agrikulturaj temoj kaj pri vivo de nova moderna vilaĝo. Li volas ricevi agrikulturajn kaj aliajn gazetojn, kiuj estos rekompencataj laŭ ilia valoro. Respondo garantiita.

S-o Ĉeslavo Gostomski, 30-jara oficisto, 3-go Maja, n-ro 8, Jeziorany, Warmia-Mazury, Pollando, per poŝtkartoj kaj leteroj.

S-o Jiro. Ogawa, 105-2, Honnden, Nishi-ku, Osaka (Japanujo), 28-jara oficisto, interŝanĝi Esp. gazetojn kaj korespondi.

S-o Joŝio Kurozaŭa, Kamikyo-Kyoku, Sin oomiyo agaru, Kyoto-Si (Jap.), 17-jara studento, interŝanĝi il. poŝtkartojn.

S-o Yoshinori Okuda, 72, Joshoji, Owada-mura, Kitakawachi-gun, Osaka-fu, 22-jara studento de Teknika Universitato, pri literaturo, fotografado, landaj kutimoj, poŝtmarkoj.

ESPERANTISTA VIVO

Doktorigo. — JUDr Miloš Nývlt, nia daŭre aktiva membro en Praha, estis promociita la 27-an de julio en Karlo-universitato. Sinceran gratulon!

Edziĝo. Kamila Lampřová, nia fidela membrino en Okříšky, kaj Ladislav Bártl en Brno la 4-an de aŭgusto 1951. Ilia edziĝanonco estas en la ĉeĥa kaj en Esperanto. Elkorajn bondezirojn.

Hector Hodler: LA LASTA MILITO?

La nuna milito diferencas de la antaŭaj ne sole per siaj grandegaj proporcioj, per la mirinda perfektigo de la detruilaro, per la graveco de la homperdoj, per la profundaj transformoj en la ekonomia vivado de la popoloj, per la sendecida karaktero de la armeaj operacioj, sed ankaŭ — tio estas la plej grava el ĉiuj konsekvencoj — per la influo, kiun ĝi havas je nia pensmaniero.

Dum la hombuĉadoj de la pasinto ne vekis ĉe niaj patroj daŭran reagon kontraŭ la principo mem de la milito, kiu al ili ĉiam aperis kiel natura malfeliĉo apenaŭ evitebla, ni nun kun indigno ĝin malakceptas, ni ĝin konsideras kiel senutilan barbarajon, kiel krimregon kontraŭ la homaro. Nian indignon kreskigas la fakto, ke ni komencas kompreni, ke la milito ne estas natura fatalaĵo simila al tertremo aŭ vulkansputo, sed ke, kontraŭe, ĝi povus esti evitita per ĝustatempa antaŭzorgo de la homoj. Ĝuste tial ni vidas, ke la registaroj tiel energie penas pruvi sian senkulpecon. La bataladon per la dokumentoj kaj artikoloj ili juĝas ne malpli atentinda ol la bataladon per la kanonoj.

Neniu jam povas dubi, ke la nuna milito senkreditigas la principon mem de la milito, kiu de nun aperas kiel absurdaĵo nedigna je la progresoj de la civilizo.

El tiu konstato naskiĝis la espero, ke instruitaj de la plej terura sperto, kiun oni povus imagi, la popoloj morgaŭ demetos la armilojn kaj aliĝos al la idealo de unuigita kaj pacigita homaro. Estis dirite, ke tiu ĉi milito mortigos la militon.

Tamen, esperi, ke la nuna milito estos la lasta, ne sufiĉas, por ke tio fariĝu fakto. La malamo al la milito estas valora helpilo en la batalado por la starigo de nova ordo, sed ĝi povas konduki al pozitiva rezultato nur, se nia spirito havas sufiĉe precizan ideon pri la praktikaj rimedoj por solvi novajn konfliktojn. Por vivi en bona sano ne sufiĉas maldeziri la malsanon, sed oni pli devas havi higienon, vivmanieron, kiu antaŭforigas la eblajn kaŭzojn de malsano.

Malfeliĉe, kvankam la pli multaj homoj malaprobas la principon de la milito, nur malmultaj ekzistas, kiujn interesas la demando, kiel eviti la reokazon de la nuntempa barbarajo? Etas timinde, ke je la paco la homaro, okupota de aliaj taskoj pli urgaj, refalos en la antaŭan erarsistemon kaj tiel perdos la profiton de siaj tragediaj spertoj. Kontraŭ tiu ebala danĝero — la forgeso post la suferado — ni gardu la publikan opinion, starigante antaŭ ĝi jam nuntempe la problemon pri internacia ordo en ĝia tuta amplekso. Kiu sub diversaj pretekstoj pretendas prokrasti la studadon kaj diskutadon de tiu problemo, tiu estas, ĉu li ĝin volas aŭ ne, preparanto de la estonta malordo kaj sekve de novaj militoj. Same danĝera li estas kiel la militemulo.

La serĉado de la rimedoj necesigas la konon de la kaŭzoj. Nu, en tiu rilato nia juĝokapablo estas ankoraŭ tre nesufiĉa. Ni ja kun energio denuncas la prirespondajn individuojn, kvankam ni tro ofte tion faras pli laŭ niaj impulsoj aŭ laŭ la sugestoj de la kreantoj de l'opinio ol laŭ la senpartia ekzameno de la faktoj; ni ja akuzas kaj riproĉas la „kulpajn“ registarojn; ni postulas, ke ili estu severege punataj. Sed estas rimarkinde, ke en niaj esploroj pri la militkaŭzoj ni preskaŭ ĉiam malatentas la esencan, nepersonan, konstantan elementon de

la problemo, la ĉefkaŭzon de ĉiuj militoj, nome la sistemon de la interŝtataj rilatoj, kies propra logiko superregas la volon de la registaroj kaj de la popoloj.

Ĉar ni ignoras la veran kaŭzon de la publikaj malfeliĉoj, ni povas proponi nur duonrimedojn, ĉiam samajn kaj ĉiam nesufiĉajn: puni la „kulpulojn“, ŝanĝi la landolimojn ĉe kelkaj punktoj, starigi novan ekvilibron tiel nefirman kiel estis la antaŭaj. Ni ne sukcesas eliri el fatala rondo, interne de kiu la homaro dum jarcentoj kaj jarcentoj erarvagadas, foririnta de milito kaj rekondukita al la milito, ĉar ĝi ankoraŭ ne kapablas sin regi. Tio daŭros tiel longe kiel ni obstinos imputi al homoj tion, kio en realeco estas la logika efiko de certa sistemo, pri kies konservado ĉiuj popoloj estas kulpaj. Ni ne kredu la potencon de la registaroj pli granda ol ĝi estas. Kiel ajn senskrupulaj estas certaj popolĝvidantoj, ili estus malhelpataj endanĝerigi la internacian sekurecon, se la mondo estus organizita por la paco anstataŭ esti organizita por la milito. La logiko de la sistemo estas pli forta ol la logiko de la homoj.

Internacia anarkio estas la taŭga nomo de la sistemo, kiu nin regas, kaj de kiu la milito estas neforigebla. Ĝin karakterizas la kunestado de suverenaj nacioj, kiuj en siaj reciprokaj rilatoj konas nenian alian leĝon ol sian intereson.

Feliĉe la homoj havas la povon ŝanĝi la sistemon, kiu subpremas ilin. La solvo estas konata. Ĝi konsistas en tio, ke oni anstataŭu la anarkion per ordo, la tumultan haŭson de la sendependaj nacioj per libera asocio de la popoloj. Nenies venko sufiĉos per si mem por mortigi la militon. Sole povas atingi tiun grandiozan rezultaton fundamenta transformo de la interŝtataj rilatoj realigota de la popoloj pli bone edukitaj kaj pli racie instruitaj pri iliaj veraj interesoj.

La plej granda venko, la plej fruktodona, la plej daŭra, la plej dezirinda estas tiu, kiun la homaro gajnos super si mem, sin liberigante el la katenoj de la pasinto, forĵetante la kadukiĝintajn antaŭjuĝojn, kiuj ĝin pereigas, kaj celante per ĉiuj siaj fortoj al la luma idealo de unuigita naciaro. (Esperanto, Septembro-oktobro 1917.)

Kio estas internacia spirito? Ĝi estas simple la apliko, sur la kampo de la interpopolaj interrilatoj, de la principo de reciproka komprenemo kaj toleremo. Kiel iu nacio ne estas prosperkabla, se inter ĝiaj membroj regas malfido kaj malamo, tiel same neniu internacia ligo povos daŭre ekzisti, se inter la popoloj alte staras muroj de reciproka nekompreneo kaj netolero. La plej raciaj proponoj pri evito de estontaj militoj restus senefikaj pro la malfavoraj psikologiaj kondiĉoj, kaj malgraŭ sia deziro al paco, la homaro, pro la persisto de la intergentaj malamaj, estus fatale puŝata al novaj katastrofoj.

Paralele kun la politika kaj jura laborado sin do trudos al ĉiuj pioniroj de l'nova ordo alia agado, kiu per ĉiuj rimedoj celos la plibonigon de la moralaj rilatoj inter la popoloj. Kaj ĉu inter tiuj rimedoj la plej grava, la plej efika, ne estas la disvastigo de komuna helpa lingvo, dank' al kiu la popoloj ĉesos esti fremdaj unuj rilate al la aliaj kaj iom post iom akiros la konscion, pri sia aparteno al la homara familio? Certe neniu asertas, ke nur per la enkonduko de tia lingvo oni atingos staton de daŭra paco, sed ke ĝi estas grava elemento de la internacia problemo, neniu saĝa povas nei. Ĉiu partiano de nova ordo internacia, kiu indiferente aŭ skeptike rilatas al tiu demando, fakte, kvankam

nekonscie, agas kontraŭ sia celado kaj malharmonie kun siaj ideoj. Ni scias, ke bedaŭrinde multaj estas ankoraŭ la indiferentuloj pri internacia lingvo en tiuj rondoj. Al ni, esperantistoj, apartenas la tasko veki ilian atenton, admoni ilin al kunlaboro kaj substreki la neceson de nia lingvo en la rekonstrua postmilita periodo.

Sed por tio estas ankaŭ necese, ke la esperantistoj mem komprenu, ke la sorto de ilia lingvo estas intime ligita kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia.

Hector Hodler: Nova Spirito („Esperanto“, decembro 1917.)

Hector Hodler (1887—1920), jeden z hlavních zakladatelů *Universala Esperanto-Asocio*, redaktor „Esperanta“ až do své předčasné smrti, přispěl podstatně také k rozvoji esperanta po slovníkové a stylistické stránce. Věnoval ve svém listě mnoho místa tematům časovým, politickým a sociologickým. Heslo užívat esperanta místo o něm diskutovat ukázalo se velmi plodným pro rozvoj esperanta i po stránce jazykové.

Několik rčení.

krađl se do pŕikopu — li ŝtelrampis en fosaĵon
 nikdo to nepopirá — tion neniu kontestas
 pŕehlížeři hlavní motiv — malatenti la ĉefan motivon
 To ĉlověka poznamenává — Oni iĝas markita per tio
 ŝeŝeznė odpadky — ferfalaĵoj
 skluzavka — deglíteĵo — Filp: glitrelvoĵo
 svěrací kazajka — trudjako
 Neŝetřil peněz ani námahy — Li ŝparis nek monon nek penon

Mráz kopřivu nespáří — Urtikon frosto ne difektas
 Neznalost zákona neomlouvá — Nesciado de leĝo neniu pravigas

Moudrému napověz — Por saĝulo sufiĉas aludo
 Zpráva dotkla se mne bolestně — La sciigo trafis min dolorige

Imperialismo estas kapitalismo en tiu evoluo-stadio, kiam kreigiĝis estreco de monopoloj kaj financa kapitalo, kiam eksporto de la kapitalo akiris elstaran signifon, komenciĝis divido de la mondo fare de internaciaj trustoj kaj finiĝis disdivido de la tuta tersurfaco inter la plej fortaj landoj (Lenin, Verkaro, vol. XXII, paĝo 253 de la rusa eldono).

Mi enŝias al niaj nepoj kaj pranepoj, kiuj estos vidantaj Ruslandon en jaro 1940 starantan frunte en klerigita mondo, donantan leĝojn al scienco kaj arto kaj akceptantan amoplenan omaĝon de la tuta homaro. (V. G. Belinskij.)

Majstro. La unua, kiu uzis la vorton „Majstro“ estas d-ro A. Nauman (tiam en Vilno). En la fino de 1891 jaro s-o Nauman originale verkis alegorian mirrakonton „La Mirinda Liro“, en kiu li unuafoje uzis la aluditan vorton. (Anatolo Koň, Varsovio, en La Ondo de Esperanto, Julio 1912.)

LINGVISTIKO KAJ ESPERANTO

Du branĉoj de la lingvistiko rekte koncernas Esperanton:

a) La interlingvistiko estas tiu branĉo, kiu celas trovi la plej kontentigan solvon de la planlingva problemo. Kiel ni poste vidos, multaj profesiaj lingvistoj nuntempe partoprenas la interlingvistikan laboron. Neniu scienco povas ignori la rezultojn de antaŭuloj. Esperanto estas ne nur planlingva projekto, sed ankaŭ la sola planlingvo kiu dum longa tempo trovis sufiĉe ampleksan aplikon. La interlingvistiko do ne rajtas preteratenti Esperanton. Ĉiu interlingvisto estas libera serĉi alian solvon, sed science li agas nur tiam, se li

bazas sin ne sole sur teoriaj konsideroj, sed ankaŭ utiligas la praktikajn spertojn akiritajn per Esperanto.

b) La esperantologio estas tiu lingvistika branĉo, kies speciala studobjekto estas Esperanto. Kontraste kun la interlingvistiko, kiu havas kreaĵon celon, ĝi estas scienco konstanta kaj priskriba.

La Esperanto-gazetaro ne kutimas dediĉi multan spacon al la laboroj kaj pretendoj de la interlingvistoj. El propaganda vidpunkto tiu sinteno eble ŝajnas oportuna, sed anstataŭ tute prisilenti aŭ moke bagatelumi la kontraŭulojn estus pli utile science esplori, kiu partio pravas. Se tiam montriĝos, ke Esperanto estas la sola aŭ la plej sekura vojo al la celo, nia esploro havigis al ni valorajn argumentojn en la batalo kontraŭ la propagando, nuna kaj estonta, de la interlingvistoj; male se post objektiva ekzameno ni devus konfesi, ke ni efektive eraris, kaj ke pravas la aliaj, tiam estus pli bone kapitulaci antaŭ la vero ol blinde batali por lingvo fiaskonta.

Ekzakta esploro de la duobla demando, kiujn kvalitojn la teorie plej bona planlingvo devas posedi, kaj ĝis kiu grado Esperanto respondas al tiuj idealaj normoj, nepre estas utila kaj dezirinda, eĉ se la finrezulto ne konformus kun la ĝisnunaj konceptoj. Por ke tia esploro konduku al fidindaj rezultatoj, necesas ke oni ne neglektu la praktikon. Tro multe la interlingvistoj ĝis nun teoriumis. La esperantologio havas la gravan taskon prui la valoron de iliaj teorioj per la faktoj kiuj manifestiĝas en la kresko kaj evoluo de nia lingvo.

D-ro W. Manders en la Enkonduko de „Interlingvistiko kaj Esperantologio“ Purmerend, 1950.

Zaĉatek Otĉenáše v esperantu a v jiných projektech mezinárodního jazyka.

1880 Volapük: O Fat obas, el súlz! paisantikomöz nem ola!

1887 Esperanto: Patro nia, kiu estas en la ĉielo, via nomo estu sanktigata!

1907 Ido: Patro nia qua esas en la ĉielo, vua nomo esez sanktigata!

1903 Latino sine flexione: Patre nostro qui es in celis, que tue nomine fi sanctificat!

1922 Occidental: Patre nostri, quel tu es in ciel, mey esser sanctificat nómín tul.

1928 Novial: Nusen patro kel es in siele, mey vun nome bli sanktífika.

Ĉu oni povis buŝe interkompreniĝi per Volapük?

L. v. Munster skribis al La Progresanto: (la 15. aŭg. 1951): „Oni malkaŝe parolis pri la fiasko de Volapük en la tria internacia kongreso de Volapük en 1889 en Parizo. Tiam ĉiuj diskutoj estis ekskluzive en la mondlingvo. Eĉ diskutoj okazis: ne nur pro la despota sinteno de Martin Schleyer, sed ankaŭ pro tre gravaj miskomprenoj kaŭze de l'neprononcebleco de multaj vortoj tute fremdaj al Volapükistoj de malsamal landoj. Tumulte la kongresanoj disiris. Tiujn faktojn mi aŭdis ne sole de homoj legintaj pri ili, sed ankaŭ de mia patro, kiu tiutempe (ĉ. 1889) fervore propagandis por Volapük kiel instruisto de tiu mondlingvo.“

Marie Majerová:

URBO SUB SIGNO DE FAJRO

Poezia priskribo de Kladlo en majstra traduko de Božena Vlčková. Taŭga donaco por viaj eksterlandaj amikoj. Prezo Kčs 32,50 afrankite. Mendu tuj ĉe Librovendejo de EAĈSR